

Seleco



Pres-organo de:
Astura Esperanto-Asocio



Numero 81

Oktobro 2006



Seleco



Pres-organo de:
Astura Esperanto-Asocio



Numero 81

Oktobro 2006

Astura Esperanto-Asocio

Sidejo: strato Begoña, 25 - 2a etaĝo
33206-GIJÓN (ASTURIO -HISPANIO)

Interret-paĝo: <http://uica.info/esperanto>

Ret-adresoj: asturias@telecable.es
esperanto@uica.info

ASTURA ESPERANTO-ASOCIO estas esperantista rondo kiu plenumas sian rolon favore al la disvastigado de la Internacia Lingvo unualoke en nia urbo, Gijón, kaj ankaŭ, laŭeble, en tiuj zonoj de la Asturia regiono, kie ne ekzistas lokaj grupoj de Esperanto.

Nia agado disvolviĝas kadre de:

Cátedra JOVELLANOS de Extensión Universitaria

<u>Enhavo</u>	<u>Paĝo</u>
Astura Esperanto Asocio: NIA DUMJARA LABORADO	3
Esperantistaj notoj	10
Intervjuo al partoprenintino de la kurso	11
La tombo apud la pom-arbo	12
Promenante kun Boris	14
Iu rakonto de Paulo Coelho	15
5a Centjaro	16
Kristoforo Kolombo laŭ Salvador de Madariaga	17
Kvar ŝip-vojaĝoj kiuj ŝanĝis la mondon	23
La mult-vizaĝa homo	24
70 jarojn poste	25
65a Hispana Congreso de Esperanto	26
Iomete da humoro	29
Kuirante kun Pilar	30
91a Universala Congreso de Esperanto	31

La enhavo de la tekstoj de ĉi tiu revuo ne esprimas oficialan opiniön de **Astura Esperanto-Asocio**; pri ili respondecas la verkintoj mem.

Leĝa Registro, numero 0/319/85



Astura Esperanto-Asocio

NIA DUMJARA LABORADO



Laŭkutime en ĉiuj numeroj de nia revuo, ni raportas pri la agado de nia Asocio ekde la eldonado de la antaŭa numero de **HELECO**. Kaj tio aldirektas nin pritrakti, precize, tiun numeron de la revuo. La 80a numero de **HELECO** estis la unua kiu estis tute publikigita en koloroj. Kaj estis ankaŭ la lasta


publikigita dulingve. Ĉi tiu 81a numero estas nur Esperantlingva; ni devas ekpliki la kialon de tiu ŝanĝo. Dum multaj jaroj ni publikigis la revuon en la hispana lingvo krom en Esperanto kaj sendadis ekzemplerojn el ĝi al ĉiuj lernejoj kaj gimnazioj de nia urbo kaj aliaj urboj de nia regiono krom al multaj asocioj, ĵurnaloj kaj aliaj amas-komunikiloj. La celo de tiu amasa distribuado de **HELECO** estis diskonigi Esperanton inter la publiko. La sistemo laŭŝajne ne estis efika; la sendo de la revuo al lernejoj kaj publikaj institucioj ne garantias ke ĝi alvenu al la manoj de la gelnantoj kaj membroj de la asocioj. Fakte, preskaŭ neniu el tiuj centroj konfirmis la ricevon de nia publikigaĵo. Ni venis al la konkludo ke la eblaj interesatoj pri la Internacia Lingvo devas esti kontaktataj alimaniere. Kaj ŝajnas ke tiurilate ni troviĝas nun sur la ĝusta vojo kun la publikigado de nia retpaĝo, pri kiu ni detale raportos poste. Krome estis alia fakto kiu konsilis kaj eĉ devigis nin agi alimaniere. La sendado de tiom granda kvanto da ekzempl-

eroj de nia revuo postulis mon-elspezon kiun nia modesta Asocio ne povis elteni. Tia maniero propagandi pri Esperanto estis al ni ebla nur dank' al la subvencioj kiujn tiucele ni ricevadis el la Katedro "Jovellanos" pri Universitata Disvastigado kaj el la Prikultura Komisiono de la Urba Konsilantaro. Nu, pasinta jaro ni ne atingis tian subvencionon, do ni devis rezigni pri la kutima distribuado de la revuo. Sed ĝuste tiam ni sukcesis funkciigi nian interretan paĝon:

<http://uica.info:/esperanto>

per kiu oni povas aliri, malpli-koste, al pli ampleksa publiko, fakte al ĉiu retano en la mondo interesiĝinta pri Esperanto. Do, ni presigis nur malmultajn ekzemplerojn de **HELECO-80** destinitaj al tiuj membroj de nia Asocio kiuj ne estas konektitaj al Interreto.

Kaj de nun tia estas/os nia plano pri **HELECO**: ĉi tiu numero, la 81a, kaj la sekvontaj estos surpapere distribuat/ot/a al la membroj de Astura Esperanto Asocio kiuj ne disponas de komputilo konektata al la monda reto. Sed la ĝenerala publiko povas vidi ĝin tra Inter-reto, kie baldaŭ



La 80a numero de HELECO estis inter la unuaj materialoj publikigitaj en nia interreta portalo.

estos aldonitaj ankaŭ ceteraj numeroj de la **HELECO**-kolekto.

Kaj temante jam pri nia retpaĝo, ni devas diri ke post ĝia ekfunkciado, fine de la pasinta jaro, estis enkondukitaj en ĝi multaj, diversstilaj, kunlaboraĵoj; ĝia enhavo sufiĉe kres-



Asturias patria querida
 Asturland' patruj' amata
 Axuntabense
 Amuza kunven'
 Chalaneru
 Pramisto
 El Quosanu
 La Kirozano



BENEDICTI PP. XVI
 SUMMI PONTIFICIS
 LITTERAE ENCYCLICAE
 DEUS CARITAS EST
 EPISCOPIS
 PRESBYTERIS ET DIACONIS
 VERIS ET MULIERIBUS CONSECRATIS
 OMNIBUSQUE CHRISTIFIDELIBUS LAICIS
 DE CHRISTIANO AMORE


PROOEMIUM



ENCIKLIKA LEFERO
 DIO ESTAS KARITATO
 DE LA ĈEFPONTIFIKO
 BENEDIKTO LA 16a
 AL LA EPISKOPOJ
 AL LA PRESBITEROJ KAJ DIAKONOJ
 AL LA KONSKRITAJ PERSONOJ
 KAJ AL CIU LAIKAJ FIDELULOJ
 PRI LA KRISTANA AMO



stano novajoj
 vi estas ĉi tie: hejmo > news



Originala versio	Traduko de Alfredo Villa Villa	Traduko de Akleblado Genciano Mreana
Asturias, patria querida, Asturias de mis amores, quien estuviera en Asturias, en todas las ocasiones	Asturland' patruj' amata, Asturland' de l'amo mia, forgesi vin mi ne povas, mi portas vin en kor' ĉiam	Amata land' Asturio, vin amas mi tre korvarme, mi ĉiam esti deziras en vi. Vi logas min ĉarme

Antaŭa paĝo 1 sekva paĝo

UNUA AKTO

En la ĉambro de la demandisto Roĝa, Roĝa sidas apud tablo sur kiu estas mapoj, paperoj diversaj, kaj disaŭdigilo malgrandega. Apud li staras polica oficiro hungara.

La oficiro: (sin klinanta super la mapo, kaj montrante punktojn sur ĝi): Ci-tie, en Sombotej, La landlimon ili trapasis apud la jugoslava vilaĝo Apatobaĉ. Ili transiris la Dragon dum la nokto. La gardistoj ne perceptis ilin. Dum la mateno informis al ili unu el la kontrabandistoj.

Roĝa: (leganta paperojn kiu estas antaŭ li): La franco kaj la junvirino... Maria Brunza (li ridas) Ĝi estas...

ADIAŬ, ĜIS LA!

mi mi redonar al la popolojflugon poran, por ke ĉiuj vokadu la nomon de la Eternulo kaj servadu

AVILÉS 18 DECEMBRO

Esperantista Festo jaro 2005

Restaurante La Estaca

Valideco de la Komunista Manifesto en la jarcento de la tutmondiĝo

verkis: Faustino Castaño

1. Kristnaskon al vi gajegan.
 Kristnaskon al vi gajegan.
 Kristnaskon al vi gajegan
 deitas al ja.

Kun bona sperto!
 Ĉium tuta la jar!

Al tuta la parencazo: nun adiaŭ, ĝis la!

La enhavo de nia ret-paĝo estas diversstipa kaj ampleks-temara

kiĝis laŭlonge de la tuta jaro. La temaro de la paĝo estas ampleksa; oni povas diri ke ĝi estas malfermata al, ĉiuspecaj aferoj celante montri ke pere de Esperanto oni povas pritrakti ĉiun temon kun homa intereso. Per tiuj medioj ni, kune la ceteraj grupoj kaj aktivuloj de nia E-movado, kontribuas al la disvastigo kaj diskonigo de la Internacia Lingvo inter la publiko kiu ne konas ĝin. Tia dediĉiĝo al nia afero igas nin tre sentemaj rilate al ĉio kio povas damaĝi la progreson de Esperanto. Foje la amas-komunikiloj, eĉ senintence alprenas teniĝon kiu, fakte, kontribuas misinformi pri nia afero kaj konfuzigi la neesperantistan mondon. Fine de la pasinta jaro iu ampleks-eldona revuo de nia lando (XL Semanal) publikigis artikolon de Juan Manuel de la Prada, kiu, temante pri iu el la multaj lingvo-projektoj foje aperantaj en la mondo komparis ĝin kun Esperanto pri kiu li diris ke ĝi mortis pro inanicio. La ekzistado de tiu artikolo baldaŭ diskoniĝis tra la esperantista movado kiu reagis sendante skribaĵojn kaj mesaĝojn al la redaktejo de tiu revuo plendante pri la ne-ĝusteco de tiu info-

mo. Nia E-Asocio partoprenis en tiu zampanjo per la sendo de skribaĵoj verkitaj de Santiago Mulas kaj Faustino Castaño alportante datumojn pri la vigleco, vivkapablo kaj amplekso de la esperantista movado kaj utileco kaj neceso de la Internacia Lingvo. Ambaŭ tekstoj, kompreneble, en la hispana lingvo, estas legeblaj en la interreta paĝo de nia Asocio. Kaj ankaŭ fine de la jaro, konkrete la 18an de decembro, nia Esperanto-Asocio festis la t.n. Zamenhofan feston kune kun la membroj de la E-Grupo ANTAŬEN de Avilés. Ĝuste en tiu urbo okazis tiu esperantista festo la jaron 2005. La membroj de ambaŭ esperantistaj rondoj kuniĝis matene en la centro nomata "Casa de la Cultura", kaj poste, en la tie proksima parko "Las Meanas" procedis al la surmetado de floraj bukedoj sur la nomtabuloj de la tiea promenejo "Esperanto". Kelkaj el la fotoj de nia tiutaga kolekto prezentas bildojn de tiu tago. La tuta fotoserio de tiu tago, kune kun la koncerna raporto pri la festo estas prezentata en la interreta paĝo de nia Asocio.



Esperantista festo en Avilés, la 18an de decembro-2005

En la menciita ret-paĝa raporto pri tiu festo ni diris ke, pro ĝia propra naturo, la laboro de la geesperantistoj estas publika, adresita al la publiko, ĉar la celo de nia movado estas diskonigi la Internacian Lingvon en la sociaj medioj kie ĝi ankoraŭ ne estas konata. Sed ĉar tiu propaganda laboro disvolviĝas en malfavoraj cirkonstancoj kiuj kontraŭas nian aferon, ni bezonas, de tempo al tempo, la moralan apogon kaj solidarecon de niaj gesamideanoj spertantaj saman situacion. Tiuj esperantistaj festoj kaj renkontiĝoj estas konvenaj kaj necesaj okazoj por ĝui tiun fratecon de niaj geamikoj en agrabla etoso kaj donas al ni eblecon "ŝarĝi la piloĵn" por plue kapabli disvolvi nian poresperantan laboradon. Tia agrablan kaj amikecan etoson ni trovas ene de niaj esperantistaj rondoj. Posttagemeze de tiu tago la aro da geesperantistoj kuniĝintaj en Avilés havis bankedon en iu restoracio de tiu urbo. Tie estis faritaj la

subaj fotoj dum la agrabla postmanĝa babilado kaj kantado.

Temante pri la laboro de nia Asocio dum la jaro ni devas ne forgesi la ĉefan taskon de ĉiu esperantista kolektivo: la instruado de la Internacia Lingvo. Nia E-grupo organizas ĉiujare bazan kurson de Esperanto, kiun gvidas, de antaŭ multaj jaroj, Santiago Mulas Gallego, Prezidanto de la Asocio.

Sed en la jara periodo kiun ni komentas ni sukcesis realigi iun antikvan aspiron de nia Esperanto-Asocio: la organizado de kurso de Esperanto en la Universitato de Oviedo. Post iu fiasko tiurilate, antaŭ kelkaj jaroj, fine ni povis plenumi la kondiĉon menditan de la Universitato: la ekzistado de du universitataj profesoroj pri la Internacia Lingvo kapablaj gvidi la menditan kurson. Tio eblis dank' al doktorino María José Alvarez Faedo kaj profesoro Carlos Enrique Carleos Artime.

La kurso komenciĝis la 3a de marto sed en



Esperantista festo en Avilés, la 18an de decembro-2005


tiu sama tago okazis en la Universitato de Oviedo alia grava akto rilate al Esperanto kaj al nia Astura Esperanto-Asocio. Okazas ke pasinta jaro oni festis en nia lando la 4an Centjaron de la publikigo de la unua eldono de la Kihoto. Kadre de la aktoj organizitaj en Hispanio por tiu celebrado, la Fundacio de Esperanto kontribuis per la disdonado, al publikaj prikulturaj centroj, de la esperantlingva versio de tiu verko. Nia Astura Esperanto Asocio kunlaboris en tiu tasko kun la Fundacio de Esperanto per la transdono de du ekzempleroj de tiu verko, kune kun ekzempleroj de nia propra eldonaĵo, ASTURA BUKEDO, al la Universitato de Oviedo.

Konkrete, la vendredon, 3-an de marto, ni procedis al la unua transdono. La fotografajo en ĉi paĝo montras tiun akton. Profesoro Carlos Enrique Carleos Artime (maldekstre en la foto), el la estraro de Astura Esperanto Asocio, kaj doktorino María José Álvarez Faedo (apud li en la foto), ambaŭ gvidantoj de la Kurso de Esperanto kiu komenciĝis, la saman tagon, en tiu Universitato de Oviedo, transdonis la libron de la Kihoto en Esperanto al la Vicrektorino de la Universitato, Margarita Fuente Noriega, kaj al la Direktoro de la Biblioteko de la Universitato, Ramón Rodríguez Álvarez. La prezentado de la akto estis farita de Luis Valdés Pelaez (dekstre en la foto), Direktoro de la Katedro Jovellanos de Universitata Disvastigado, institucio en kiu estas

enkadrigata nia Asocio de Esperanto. María José kaj Carlos Enrique esprimis la kialojn de tiu donaco: krom la celebrado de la 400-jara datreveno de la Kihoto, diskonigi ankaŭ la gravan esperantan tradukon de Fernando de Diego, eksplikante ankaŭ tion ke la sama Fernando de Diego kunlaboris ankaŭ en la tradukado de la verko "Astura Bukedo" eldonita, en la jaro 1987, fare de nia E-Asocio. S-ino Fuente tre interesiĝis pri la nuna kurso

de Esperanto en la Universitato, kaj deziris al ni sukceson en tiu laboro.

S-ro Rodríguez informiĝis pri la tradukado de la Kihoto en Esperanton. Ĉiuj ili afable dankis la Fundacion de Esperanto kaj nian E-grupon pro la donacado de tiu libro kaj ankaŭ pro la donaco de



La 3an de marto-2006. Unua transdono de la Kihoto en Esperanto kaj ASTURA BUKEDO al la Universitato de Oviedo. De dekstre al maldekstre: S-ro Luis Valdés, direktoro de la Katedro JOVELLANOS, Ramón Rodríguez Álvarez, direktoro de la Biblioteko de la Universitato, Margarita Fuente Noriega, Vicrektorino de la Universitato de Oviedo, Doktorino María José Álvarez Faedo kaj Profesoro Carlos Enrique Carleos Artime, profesoroj de la Kurso de Esperanto kiu komenciĝis tiutage en la Universitato.

nia traduko ASTURA BUKEDO.

La dua transdono okazis la 20an de aprilo. Ĉi-foje la donaco estis destinita al la biblioteko pri humanismaj studoj de la sama Universitato. Tiu transdono enkadriĝis en alia esperantista akto en la Fakultato de Filologio de la Universitato de Oviedo: Profesoro Antonio Valen, el la Hispana Esperanto Federacio, prelegis pri la traduk-verkado de Fernando de Diego ĝenerale, kaj ĉefe pri ties tradukado de la Kihoto al Esperanto. Prezintis la preleganton doktorino María José Álvarez Faedo. Valen, priskribis la vivon kaj dumvivan laboradon de Fernando de Diego, forpasinta antaŭ kelkaj monatoj, kaj eksplikis ties kriteriojn kaj la metodojn



La 20an de aprilo. Dua transdono de ekzempleroj de la Kihoto en Esperanto kaj ASTURA BUKEDO al la Universitato de Oviedo, ĉi-foje al ties biblioteko pri humanismaj studoj.

de tradukado, inter kies verkado, la tradukaĵo de la Kihoto estas nur unu inter multaj aliaj. Inter la publiko, krom geesperantistoj de la Asturia regiono estis ankaŭ profesoroj kaj gestudentoj de la Universitato kiuj interesiĝis pri la prelega temo kaj intervenis poste en la sekva debato.

Poste oni efektivigis la transdonadon de la ekzemplero de la Kihoto en Esperanto, donita de la Fundacio de Esperanto, kaj ekzempleron de la verko ASTURA BUKEDO, donita de Astura Esperanto Asocio, al Isabel Suárez Melgar, direktorino de la biblioteko pri humanismaj studoj de tiu Universitato de Oviedo.

Dume, la kurso de Esperanto en tiu Universitato, komenciĝinta la 3an de marto, daŭris ĝis la 19 de majo. Pli ol dudeko da gestudentoj de tiu centro enmatrikuliĝis por tiu kurso, kiu normale disvolviĝis subgvide de doktorino María José Álvarez Faedo kaj profesoro Carlos Enrique Carleos Artime, ambaŭ apartenantaj al instrua personalo de tiu Universitato.

En la programo de la Fermo de la kurso, la 19an de majo, estis inkludita iu prelego pri Esperanto kaj ties rolo kiel neŭtrala ligilo inter popoloj kaj kulturoj. Prelegis Faustino Castaño, el la estraro de nia Esperanta Asocio, kaj ĉeestis la prelegon, krom la gestudentoj de la universitata kurso, ankaŭ aliaj personoj ne ligitaj al la universitataj medioj, iuj el ili apartenantaj al la esperantista movado sed plejparto el ili sen antaŭa rilato kun la Internacia Lingvo.

La preleganto emfazis la neŭtralecon de Esperanto kaj reliefigis ke tiu eco estas unu el la du argumentoj favore al tiu Internacia lingvo kiel punta lingvo aŭ ligilo inter la nacioj. La alia argumento, li diris, estas la facileco de tiu lingvo, sed pri tio ne estas necese insisti ĉar la gelernantoj mem, kies kurso finiĝas, povis praktike konstati la facilecon de la lernado de Esperanto kompare al aliaj lingvoj.

Li aldonis ke la uzado de Esperanto kiel neŭtrala ligilo inter popoloj kaj kulturoj, ja, estas la komenca alvokiĝo de tiu lingvo laŭ la pla-



Prelego de Faustino Castaño en la Universitato de Oviedo, la 19an de mayo, pri Esperanto kaj ties rolo kiel neŭtrala ligilo inter popoloj kaj kulturoj.

no kaj konceptado de la aŭtoro mem de la lingvo. Sed samtempe estas plano plene realigebla en la estonteco, kiam Esperanto atingu la celon por kiu ĝi estis kreita. Tamen, ankaŭ en la nuna tempo ĝi estas jam ludante, fakte, tiun rolon. T.e., Esperanto estas nek utopio nek ĥimero; ĝi estas realaĵo. Eĉ se malgranda realaĵo, tamen ja realaĵo, kiu bone funkcias kaj pruvis ke ĝi tute utilas por la celo por kiu ĝi estis kreita.

Realaĵo malgranda sed tamen ne sensignifa. Kiel elmonro de la vigleco kaj intensa uzado de Esperanto en la nuntempo sufiĉas pritaksi ĝian ĉeeston en la monda reto (*Interreto*). Milionoj da ret-paĝoj en kaj pri Esperanto atestas pri tio ke Esperanto estas afero kiu vekas ioman intereson en nia mondo. Resumante la nunan situacion de tiu In-

ternacia Lingvo en la nuna mondo oni povas diri ke la Esperanto-afero iras senhalte survoje al ĝia celo, de kiu, tamen, ĝi troviĝas ankoraŭ sufiĉe malproksima.

Esperanto, aldonis la preleganto, enviciĝas kun ĉiuj ceteraj aferoj uzataj por plibonigi la homan vivon, t.e. ĝi estas ilo de tiuj personoj kiuj opinias ke alia mondo estas ebla kaj kiuj laboras favore al la konstruado de tiu nova mondo pli justa kaj solidareca. Kaj tiu aspekto de Esperanto estas ja heredaĵo de la penoj kaj laboroj de la iniciatinto mem de Esperanto, la Doktoro Lazaro Ludoviko Zamenhof, kiu asertis ke en la kerno de sia Internacia Lingvo enestas ia **interna ideo**, iu ideo kiu movigis lin kaj igis lin venki ĉiujn malfacilaĵojn, ideo kiu movigas ankaŭ liajn sekvantojn, la geesperantistojn.

Sufiĉe granda parto el la prelego estis dediĉita al la historio de la naskiĝo de Esperanto kaj la ideologia evoluado de Zamenhof, ekde lia cionisma inklino, dum sia junaĝo, al la komopolitisma aŭ homaranisma teniĝo kiun li estis alpreninta en sia plenaĝo.

Tamen, cele de ke la prelego ne rezultu tro peza oni enkondukis en ĝin iujn amuzajn elementojn. Profitante tion ke en la prelega ĉambro estis kom-putilo kies ekrana bildig-sistemo estis konektita al projekciilo bildiganta sur granda ekrano saman enhavon ol ties de la komputilo, la preleganto montris per ĝi al la ĉeestantaro diversan priesperantan materialon elprenitan el Interreto, ĉefe, enhavon el la propra retpaĝo de Astura E. Asocio.

En fina parto de la prelego okazis la kutima debato aŭ demandoj de la ĉeestantoj. Ne nur la gelernantoj de la kurso interesiĝis pri aspektoj de la enhavo de la prelego sed ankaŭ inter la ceteraj ĉeestantoj ek-estis demandoj. Plejparto el la petitaj klarigoj rilatis al la influo kaj enradikiĝo de Esperanto en la diversaj landoj aŭ mondaj zonoj.

Daŭrigante la raportadon de la dumjara agado de nia E-Asocio, nun ni devas raportiri pri la jara Asembleo de la membroj de tiu grupo. La tagojn 30a de marto kaj 11a de majo efektiviĝis la Ordinara Asembleo de la Asocio, en kiu, krom la kutimaj demarŝoj rilate al la fukciado de la organizaĵo, kiel la planado de la nova(j) lernokurso(j) de Esperanto, oni prenis decidojn rilate al la publikigoj de la Asocio. Jam estis menciitaj la ŝanĝoj kiujn oni decidis fari pri la revuo. Krome oni devas aldoni la decidojn eldoni

informilojn destine al la membroj de la grupo tial ke la apero de la revuo nur unufoje en la jaro ne alportas al nia membraro akuratan informon pri la agado de la Asocio. El tiuj informiloj estis eldonitaj jam la du unuaj numeroj, kiujn, krome, oni povas vidi en nia Interreta paĝo.

En la asembleo oni esprimis la dankemon de la E-grupo al Santiago Mulas Gallego pro lia longa dediĉiĝo al Esperanto kaj al nia Asocio, kiel Prezidanto kaj kiel profesoro de la E-kursoj. Fine, oni elektis ankaŭ la novan estraron de la Asocio:

kiu restas konstituita jene:

Honor-Prezidanto:
Santiago Mulas Gallego.

Prezidanto:
Carlos Enrique Carleos Artime.

Vicprezidantino:
María del Mar Pescador Benavente.

Secretario:
Faustino Castaño Vallina

Kasisto:
Santiago Mulas Gallego.

Presaro:
Faustino Castaño Vallina.

Bibliotekistino:

María Luisa Castaño.

Voĉdonantoj:
Ildefonso Domínguez Losada, Eduardo Montoto kaj Celia Rendueles.

Ni ne povas meti finon al tiu ĉi longa raportado pri la agado de nia Esperanto-Asocio sen memori ke dum la jara periodo pri kiu ni raportis forpasis tri samideanoj el nia esperantista rondo: Manuel Fernández Suárez, kiu mortis la 12a de januaro, Ángel García Sánchez, la 31a de marto, kaj Juan Corral Heredia, la 28a de majo. Al iliaj familioj ni esprimas nian kondolencon.



Ĉiujare ni, la geeesperantistoj, festas en dato proksima al la 15a de decembro, la datrevenon de la naskiĝo de D-ro. Zamenhof, iniciato de la Internacia Lingvo. Kutime, ni nomas ĉiun feston "Zamenhofa Tago". En Asturo, la nun ekzistantaj Esperanto-grupoj, tiuj de Ojún kaj Avilés, kunigas por tiu festado. Kiel sciate, pasintan jaron la komuna festado okazis en nia urbo, Ojún, kaj en la jaro 2005, dimanche, la 13an de decembro, la membro de ASTURIA ESPERANTO ASOCIO kaj ties de la Esperanto-Grupo ANTAŬEN, de Avilés, kunvenis en tiu urbo por festi la Zamenhofan Tagon.

Temante pri tiu ĉi festo, oni devas noti ke la kutimo de la afere ĝia ke la celebrado fariĝis interna, intima, ne-publika. Kaj rezultas tial eĉ se la esperantistoj organizas publikajn aktojn, en publikaj stratoj aŭ placoj, anstataŭ pri Esperantistaj monumentoj aŭ strukturoj kun la nomo de Zamenhof aŭ de Esperanto, kia estas nia kazo (vidu la suprajn fotojn).

Ĝenerale, la laboro de la geeesperantistoj estas publika, adrekte al la publiko, kaj tial devas esti ĉar la celo de nia Movado estas diakoniĝi la Internacian Lingvon inter la monda loĝantaro kiu ankoraŭ ne konsas ĝin. Tiu propaganda laboro, ĝenerale, ne alportas grandan plaĉon al la homoj kiuj devas disvolvi sian aktivadon meze de socio tute ne preta ricevi sian mesaĝon. Tial ni bezonas, de tempo al tempo, sperti kaj ĝui la solidarecon kaj fratecon de la geeamiceanoj kiuj affrontas saman situacion. Kiel oni diras, estas necese "fariĝi la pionirojn" por pli rezulti en la malgajna laboro. En la laboro paca ni ne lasiĝas, kiel proklamas la esperantista himno, sed kiel homoj estatoj, ne mekanikaj aĵoj, ni bezonas kuragiĝon, kaj tiun kuragiĝon ni devas trovi en ni mem, en nia E-rondito. Tial, ni, la geeesperantistoj, la piej universalsamaj inter la homaro, bezonas uru fojon en la jaro agi kaj konduti efektive en la sino de kolektivo konstituita de homoj kiuj sentas kaj spertas saman frustracion dum nia afero ankoraŭ ne iras "per frugioj de facila vento" kaj ne "rapide kreskas la afero".

Ta subaj fotoj estas faritaj, en la restoracio kie ni bankedis, dum la agrabila postmanĝa babiledo kaj kantado.

En grando Distingito María José dia, krom la geesperantistoj de la

Ĝenerale al tiu Internacia Lingvo, pri kio jam sperta la a, estas la celo de nia lingvo: laŭ vorto disvolviĝis sed ekde ekde, malgranda realigo sed tamen ĉiujn malgajna sed tamen ni ŝerpaĝoj en kaj pri Esperanto ĉiujn de nia lingvo. La homoj el malgajna lingvoj kaj ĉiujn mem, D-ĉiujn: Lester ĉiujn mem, el la postigo ĉiujn

ĉiujn regis ĝenerale optimismo kaj ĉiujn ĉiujn la alioj estas anoj de esperantistoj en Hispanio ĉiujn ĉiujn Zamenhof veki en la

kajni ĉiujn en la situacio de niaj realigita kondiĉoj la ĉiujn(aj) povojn, ĉiujn(aj) v. ĉiujn(aj) de Zamenhof mem, a me la geesperantistoj de la ĉiujn(aj) de nia lingvo, ĉiujn(aj) el

Esperantistaj notoj

Raportite de Carlos Enrique Carleos Artime



PILGRIMANTOJ AL SANTIAGO

Je la 11a de julio, en Oviedo mi renkontis S-ron Rudolf-Josef Fischer. Li estas esperantisto kiu preskaŭ ĉiujare vizitas Hispanujon. Nur dum kelkaj minutoj ni povis paroli kun li, ĉar mi alvenis tien malfrue kaj devis troviĝi baldaŭ poste en Hiĥono. S-ro Fischer interesiĝis pri la Esperanto-kurso en la Universitato de Oviedo. Li mem instruas Esperanton (krom aliajn studobjektojn) en la Universitato de Muenster (norda Germanujo).

Ĉi-jare S-ro Fischer venis kun sia edzino (kiu ankaŭ ŝi parolas Esperanton) kaj aliaj samlandanoj, por trairi la "Sankta-Jakoban vojon" (historian faskon da pilgrimaj vojoj ĝis Santiago de Compostela, en Galegujo; la plej kon-ata venas el la hispan-franca bordo).

Ili tranoktis en la rifuĝejo por pilgrimantoj ("albergue") sur la strato San Pedro Mestallón, kie jam dufoje estis S-ro Fischer. Kiam ĝia respondeculo malfermis la dormejon je la 19 horo kaj duono, li atentigis:

- Vi estas deknaŭ homoj kaj estas nur dek ses lokoj. Tri el vi devos dormi surplanke.

Kvankam li enkalkulis min en la nombro, erare, ĉar mi ne estis dormonta tie, ankoraŭ mankis du litoj. Ĉar la respondeculo parolis rapide kaj iel malklare, mi tradukis tion al niaj amikoj. Eble, ili plej rajtis dormi surlite, tial ke iliaj dorsosakoj estis lokitaj surplanke kontraŭ la muro, la plej proksimaj al la dormeja pordo; tio verŝajne signifis, ke ili alvenis la unuaj.

Malmulte poste, ni adiaŭis. Francino biciklisto alvenis tiam, ankaŭ ŝi serĉante liton en la rifuĝejo.

Ni esperas ke la pilgrimado de niaj amikoj finos ĝoje. Almenaŭ, la plej gravaj problemojn estu tio, trovi dormolokojn!

KURSO UNIVERSITATA

La Universitato de Oviedo okazigas ĉiujare aron de kursoj nomataj "de Universitata Ampleksigo". Ili similas la Somerajn Kursojn, sed okazas iam de septembro al junio.

Por la unua fojo, la Universitato de Oviedo ofertis kurson pri Esperanto kun la titolo "Enkonduko al la internacia lingvo Esperanto", estrita de D-rino Maria José Álvarez Faedo (membro de la Esperanto-grupo de Avilés, Antaŭen) kaj gvidita de ŝi mem kaj Carlos Carleos (el Astura Esperanto-Asocio, AEA). Kadre de la kurso prelegis Faustino Castaño (ankaŭ li el AEA). Mi menciis ke oni planis alian prelegon, fare de la honora prezidanto de AEA, Santiago Mulas Gallego, sed bedaŭrinde sanproblemoj malebligis lin efektiviĝi ĝin.

La kurso okazis ĉiuvendrede, de la 3a de marto ĝis la 26-a de majo de 2006. La klasoj okazadis de la 16a ĝis la 19a horo. La lernejo estis la Fakultato de Filologio, en la Universitata areo de Humanismaj studoj "Milán".

Kvankam oni ofertis kvardek vin lokojn, finfine aliĝis dudek kvin gelernantoj. La kurso kostis 123 eŭrojn, kaj estis oficiale alkonformigebla kontraŭ 45 "kreditoj" (tio estas, ĝi oficiale valoras 4,5 lernohorojn). Nenian kondiĉon oni postulis al aliĝontoj. Plejmulte el ili estis studentaj Anglan Filologion, sed partoprenis ankaŭ gestudentoj de Franca Filologio, Historio, Arta Historio, Infaninstruado, Industria Inĝenierigo, Biologio kaj Komputado, krom tri homoj ne matrikulitaj en la Universitato (al kiuj la kreditoj utilis nenion!).

Por la instruado pri E-gramatiko oni uzis la libron "Esperanto: curso del idioma internacional" de Miguel Gutiérrez Adúriz. Aliflanke, María José prelegis pri "Estinteco, estanteco kaj estonteco de la lingvo internacia" kaj "Uzado de Esperanto en internaciaj forumoj", Carlos prelegis pri "De la literaturo kaj muziko ĝis la novaj teknikoj", Faustino pri "Spertoj de esperantisto: uzado de Esperanto kiel neŭtrala ligilo inter popoloj kaj kulturoj".

Por pritaksi la gelernantojn kaj decidi iliajn kvalifikaĵojn, je la fino de la kurso ili devis verki skribaĵon (originalan au tradukitan) kun almenaŭ mil cent vortoj. Plej multe el ili preferis verki originale.

Dum la kurso, tre diversaj aferoj interesis la lernantojn. Iu demandis pri pezroka muziko en Esperanto. Alia kritikis "seksismajn" trajton de la lingvo internacia (por ekzemplo, ke ina formo de vortoj devenas el la vira versio per sufikso "-in", kaj necesas prefikso "ge-" por neŭtreco genra). Multaj interesiĝis pri interretaj rimedoj por lernado de Esperanto; tiurilate, oni taksis retpaĝaron "lernu.net" elstara, kaj ankaŭ ŝatis tiun de AEA.

Jen intervjuo al partoprenintino de la kurso, s-rino Carmen Fernández Álvarez:

- Saluton, Carmen. Antaŭ ĉio, rakontu al ni ion pri via vivo. Ĉu vi studas? Ĉu vi laboras?

- Saluton. Mi studas kvinan jaron de Historio de la Arto. Krom tio, mi ankaŭ havas stipendion por labori en la biblioteko de la Lernejo de Industriaj Teknik-inĝenieroj.

- Kial vi aliĝis al nia Esperanta kurso?

- Ĉi-jare mi decidis ĉeesti kurson "de Universitata Ampleksigo", kaj tiu pri Esperanto estis la plej interesa al mi.

- Do, vi konis iom pri Esperanto antaŭe. Kion vi pensis pri ĝi?

- Mi sciis ke ĝi estas lingvo farita de homo por celo utopia kaj romantika.

- Vi supozis ke la kurso montros al vi... kion?

- Mi pensis ke estos pli da teorio, pli da historio, sed surprizis min tio ke Esperanto estas vivanta lingvo.

- Ĉu tio plej impresis vin?

- Jes. Mi lernis ke Esperanto estas praktita lingvo. Ekzistas radio, muziko..., en Esperanto! Mi Ankaŭ miris, kiam Faustino parolis pri la homaranismo de Zamenhof, kaj pri Hilelo. Tiel mi ekkonis historiajn personojn, kiuj transiris la limojn de iliaj kulturoj kaj religioj pro tio ke ili sin sentis membroj de la tuta homaro.

- Vi ŝatis, do, tiun prelegon.

- Multe. Kaj ankaŭ la prelegon de Maria José pri la historio de Esperanto. Mi bedaŭras tion ke mi ne povis ĉeesti tiun de Antonio Valén pri la tradukado de "El Quijote" al Esperanto.

- Kaj kion vi pensas pri la lingvo mem? Ĉu la lern-

ado estas facila, aŭ ne?

- Kompare kun la angla, ĝi estas multe pli facila; post tridek horoj da lernado, mi povis skribi tekston kun mil vortoj, kaj ne nur izolitajn frazojn. Sed mi devas diri ke mi penis multe skribante ĝin. Ĉar al mi multe plaĉas la opero, mi konas vortojn francajn, italiajn, germanajn..., kaj tio helpis min memori multajn Esperantajn radikojn. Iu kunlernantino mia diris ke ŝi konis vortojn, kiel "fenestro", pro sia kono de la astura lingvo. Aliflanke, la ekzakta rilato inter skribo kaj elparolo facilas multe la lernadon. Mi havis malmultajn problemojn por kompreni la tutan aŭdigon, kiun ni faris kiel ekzercon je la fino de la kurso. Mi trovis malfacilaj, tiujn partojn de Esperanto kiuj tre malsamas la hispanan. Ekzemple, la akuzativon, la mankon de duobla neado, la diferencon

inter rekta kaj nereka objekto, la distingon inter "ĉiom" kaj "tuta"...

- Bonvolu paroli plu pri tiu teksto, kiu konsistigas la ekzamenon de la kurso. Ĉu vi efektivigis tradukon, aŭ originalan verkon?

- Dekomence mi preferis skribi ion originalan. Iu kunlernanto mia unue komencis traduki, sed li tro-

vis tiun tekston tre malfacila, ĉar li inklinis traduki tro laŭvorte, kio postulis koni multajn vortojn kaj strangajn gramatikaĵojn. Post malmulte da tempo, ankaŭ li decidis verki originale.

- Ĉu vi kutimas verki?

- Tute ne. Tre malofte mi skribas iun novelon, kompreneble, hispane. Mi preferas legi, kaj spekti kinon.

- Kiujn verkistojn vi plej ŝatas?

- Eble "malhelajn", nome Lovecraft aŭ Poe. Sed nun mi estas leganta verkon de Saramago. Vere al mi plaĉas multajn stilojn. Kio definitive ne plaĉas al mi, estas aŭtoroj kiel Dan Brown. Ekzemple, mi legis "La Da-Vinĉi-kodo"-n kaj mi trovis ĝin vanta, senrigora, malprofunda... Li skribas sen literaturaj rimedoj, tute plate... Kaj tiu verko neniel estas originala; mi havas hejme almenaŭ tri aliajn romanojn pri la sama temo.



Jen, sekvapaĝe, la noveleto kiun verkis Carmen por nia Esperanta kurso.

La tombo apud la pom-arbo

verkis: Carmen Fernández Álvarez

karmenfem@hotmail.com



Saluton, Jozefo! Kiel vi fartas? Mi skribas al vi ĉi tiun leteron ĉar mi sentas min iom timigita.

Ĉu vi memoras la grandan domon kiun mi aĉetis en la vilaĝo? Ĝi estis tre malnova kaj difektita sed havis belan ĝardenon; krome, la domo ne estis tre multe-kosta kaj mi ŝatis loĝi tie.

Mia hundo Nigreto estis tre feliĉa, ĉar ĝi povis kuri malantaŭ la birdoj kaj ludi kun aliaj bestoj.

Sed mi rakontu al vi tion, kio okazis. Estis printempo kaj la ĝardeno havis multajn arbojn kaj belajn florojn (vi scias ke mi ŝategas la florojn).

Iun tagon kiam mi estis ludanta kun Nigreto, mi aŭdis strangan sonon. Ŝajnis kvazaŭ iu estus ploranta. Mia hundo ekkuris al maljuna pom-arbo kaj bojis forte. Tiam, mi alproksimiĝis tien, kaj inter la branĉoj de la pom-arbo mi povis vidi malgrandan tom-bon. Vi scias ke mi ne estas timema, sed tiu afero estas tre stranga kaj mi volas reveni tien neniam.

Mi esperas ke vi venos baldaŭ, ĉar mi ne scias kion fari.

Ĉu vi memoras kiel veni? Vi veturu al vilaĝo kaj poste vi prenu la vojon al la haveno; tuj vi renkontos la lum-turon. Mia hejmo estas la blua domo tie proksima.

Mi esperas vidi vin baldaŭ. Ĝis!

Maria

Kiam Jozefo legis la leteron, li pensis ke li vizitos ŝin morgaŭ ĉar Maria ŝajnis esti tre ank-sia. Ŝi estis lia unua amo kaj li ankoraŭ sentis iom, do li estis maltrankvila. Dum li preparis sian valizon, li demandis al si fartus Maria. Jozefo memoris ŝiajn nigrajn okulojn kaj ŝian longan hararon, ŝi estis alta kaj maldika, bela virino; kiam ili interkonatiĝis, ŝi aĝis dudek kvin jarojn kaj ŝi estis lernanta pri pentrarto; nun ŝi jam estas fama pentristino.

Matene, Jozefo vekigis, kuiris kafon kaj manĝis toaston kaj omleton. Li pensis vojaĝi trajne ĉar ĝi estis tre rapida, sed preferis aŭti. Li veturis dum la tuta tago. Kiam Jozefo alvenis, li vidis ŝin. Maria estis atendanta apud la pordo de la domo. Ŝi salutis afable:

- Jozefo! De longe mi ne vidis vin.

Maria estis tre bela sed ŝia vizaĝo havis sulkojn kaj ŝi aspektis tre laca. Maria rakontis al li ke ŝi ne ripozas bone, ĉiun nokton ŝi vekigis je sama horo kaj aŭdis virinon plorantan.

- Vi ne timu, ni esploros tion, kio okazas.

La geamikoj eniris al la hejmo, kaj Maria montris ĝin al li. Jozefo vidis ke ĝi estas riparita, la meblaro estas nova kaj ŝi havas multajn bildojn kiuj, li divenis, estis verkoj ŝiaj. Li pensis ke la bildoj estis malbelaj kaj akraj sed diris nenion.

- Al vi ne plaĉas miaj verkoj, ĉu? - demandis Maria. Josefo ridetis embarasita.

La domo estis tre granda; ĝi havis ŝtuparon el ligno kaj la loko estis iom timinda. Kiam ili estis sidantaj ĉe la tablo, ili aŭdis boji.

- Ĝi estas mia hundo Nigreto. Ĉu vi memoras ĝin? Ĝi sentiĝas tre nervoza ĉi tiujn tagojn. Mi demandis min kie ĝi estus.

Jozefo kaj Maria estis parolantaj pri iliaj aferoj dum multaj horoj. Ambaŭ estis tre lacaj, do ŝi akompanis lin al lia ĉambro. Jozefo kuŝiĝis en la lito sed li vekigis surprizite; li aŭdis ke Maria vokis lin. Li subiris kurante la ŝtupojn kaj kaptis ŝin kiam ŝi estis falanta.

- Aŭdu ĝin, aŭdu ĝin! - ŝi ekkriis.

Jozefo nur aŭdis Nigreton en la ĝardeno. Ŝi estis ŝok-ita, kaj plorante ŝi diris al li:

- Oni diras en la vilaĝo ke ĉi tie mortis juna virino; mi ne povis kredi tion, sed mi vidis

ŝin! Mi demandis al ŝi, kiu ŝi estas, kaj ŝi respondis ke ŝi volas rakonti ŝian historion; tiam mi aŭdis krion. Mi ne estas malsana, mi ne estas freneza! - Maria tremis forte.

Jozefo provis trankviligi ŝin:

- Ĉi tiu loko estas tre malluma; eble ĝi estis ombro.

- Kaj la krio?

- Mi aŭdis nenion, sed ĝi povis esti bojo de Nigreto - li diris al ŝi.

- Mi vidis ŝin klare; ŝi estis blonda junulino; ŝi havis delikatan haŭton, preskaŭ diafana; ŝia robo estis tiel blanka kiel la neĝo, kaj ŝi ŝajnis brili! Mi bezonas ke vi kredu al mi! Tiu blankeco, ŝia voĉo... - Maria unue paliĝis kaj svenis poste.

Post kelkaj minutoj, Maria sentiĝis bone.

- Pri kio vi pensas? - demandis Jozefo.

- Ha, mi ne scias kion pensi; eble mi sentis min elĉerpita ĉar mi laboras multe, sed mi antaŭsentas ke tiu afero ne estas finita.

Ili estis promenantaj sur la ĝardeno.

- Maria, kial vi pentras bildojn tiel timindajn? Vi estas tre gaja kaj ĉarma virino. Kiam mi ekkonis vin, vi pentris mult-kolorajn verkojn, tre serenajn; vi donacis al mi malgrandan bildon; ĉu vi memoras? Al mi plaĉegas ĝi.

- Tio estis antaŭ longe. La vivo estis tre facila tiutempe.

Mi pentras tristaĵojn ĉar mia animo estas trista. Kiam ni konatiĝis, mi estis tro naiva.

Jozefo pensis ke Maria ne estis la junvirino kiun li memoris. Ŝi estis tre ŝanĝinta. Tiam, aperis Nigreto kurante kaj bojante; ĝi estis elĉerpita kaj ĝi havis koton en la muzelo.

- Nigreto! Venu vi! Vidu, Jozefo, ĝi estis fosanta apud la maljuna pom-arbo. Tie estas la tombo.

La geamikoj iris al la tombo kaj tie ili povis legi: "Mia amata fileto. Vi ĉiam estos en mia menso."

-Ho, Jozefo! Ĉi tiu estas la tombo de infano. Kia tristeco!

Tiunokte Maria aŭdis la strangan sonon kaj vidis la diafanan virinon. Ŝi diris al Maria:

- Bonvolu aŭdi min. Mi bezonas ke vi helpu min kaj mian bebon. Niaj animoj ne ripozas en paco. Mia malgrandulo vokas min kaj ploras. Kia turmento! Aŭskultu mian historion. Mi aĝis dek naŭ kaj mi enamiĝis al riĉa junulo. Li edziĝis kun mi sed mia bopatro ne estis tre kontenta, kaj li komencis malami min. Kiam mi diris ke mi estas graveda, li ekkriis kaj akuzis min adulti. Mia edzo ne kredis min; li estis kolerigita kaj freneziĝis. Nu, mi naskis mian bebon antaŭtempa sed li estis sana kaj forta. Iun nokton, dum mi estis dormanta, mia edzo mortigis mian bebon kaj enterigis lin en la ĝardeno. Kiam mi vekigis, mi diris al li, ke mi volas vidi la bebon. Li tre furiozis kaj agresis min. Mi mortis unu tagon poste. Maria, mia etulo vokadas min. Li bezonas min - tiam ŝi mal-aperis.

Matene, Jozefo vidis ke Maria tre lacis.

- Ni iru al la ĝardeno. Ŝi estas kompatinda ino; vi devas helpi ŝin.

- Mi komprenas nenion. Maria, kion vi diras?

- Ili iris kune al la ĝardeno. Apud la pomarbo ili vidis la truon kiun Nigreto estis fosinta.

- Vidu, Jozefo! Ĉi tie estas malgranda ĉerko! Ni portos ĝin al sankta-kampo, ni enterigu la bebon

apud la tombo de lia patrino. Tiel li ne ploros.

Jozefo pensis ke Maria estis malsana, sed akompanis ŝin. Ili faris kion Maria estis dirinta. De tiu tago Maria povis ripozi trankvila. Iun nokton ŝi songis ke la juna virino kaj sia bebo estis kune kaj diris al ŝi: "Ĝis!"

Kaj ĉi tiu estas la fabelo de la tombo apud la pom-arbo.

- Kia historio, paĉjo! Kaj ĉu vi ne ŝatis la bildojn de panjo? Ha, ha!

- Vi diru nenion al ŝi. Tio estas alia historio.



Promenante kun Boris



Boris ne estas malgranda, sed pli ĝuste mezgranda; har-abunda certe ĝi estas, kvankam ĝiaj haroj ne estas el la plej longaj; milda... ne multe, sed tre plaĉas karesi ĝin kiam ĝi estas ĵuse tondita; ĝi sajnas brila haregbroso. Kiam mi vokas ĝin, ĝi ne venas al mi kun gajan troteton se tiam ĝi havas ian pli allogan aferon. Mi ne estas parolanta pri *Platero* nek pri iu alia azeno, sed pri hundeto kiun mi amegas, kvankam ĝi ne apartenas al mi.

Ofte mi promenas kun ĝi. Ne estas facile trovi nuntempe trankvilan promenejon en mia urbo, Ĥiĥono, kie ne estu necese fiksi la rigardon surteren zorgante ne fali en fosajon, kiel ĵus okazis al iu malfeliĉa urbano en centra strato. La ĥiĥonanoj devos fari provizon de pacienco, ĉar la publikaj laboroj borante niajn stratojn promesas daŭri longajn monatojn... kaj eĉ kelkajn jarojn.

Boris havas konatan malamikon: temas pri *Kiko*, blanka hundeto najbara mia, kies granda estas triono ol *Boris*, sed ĝi estas tro kuraĝa kaj provokas kunfrontojn ĉiufoje kiam ili renkontiĝas, kolere, ĉar ĝi konsideras *Boris*-n entrudiginto. La disputo de ambaŭ hundoj estas amuza spektaklo kiu igas la pasantojn halti por rigardi.

Iu pasintsonera vespero, promenante ni tra la monteto "Sankta Katerino", rande de iu el la rokaj montflankoj, io altiris la atenton de *Boris*, kiu kuris tien kaj subite restis senmova, spektanta... Mi konstatis ke la celo de ĝia intereso estis malhele griza kato, kiu komencis sibli kun la dorso kurbigita. Pene rezultis al mi fortreni de tie *Boris*-n, altirita de la danĝera feliso. Kia senkonscieco!

Serĉe de pli da trankvileco, ni iris al la Okcidenta strando. La laboroj en la Akvario antaŭeniras, kvankam tro prokraste, post la decidigaj bataloj en kiuj

estis mergitaj la laboristoj, kiuj estis la propeka kapro de la laboraj konfliktoj en najbara ŝipkonstruejo. En tiu momento estis finita la okdek procento de la laboro. Fine, la Akvario estis inaŭgurita iuj monatoj poste, konkrete la deka de junio de 2006. La okazo estis profitita de la laboristoj de la ŝipkonstruejo por manifestacii siajn depostulojn antaŭ la ĉeestantaj aŭtoritatuloj.

Feliĉe, la Akvario havas multe da vizitantojn. Cetero, kiu estos la destino de la tunoj da koto akumulitaj kaŭze de la iama industria aktiveco? Dio volu, ke ili ne estu denove ĵetitaj en la maron, kelkajn

marmejlojn malproksimen, kvazaŭ tiele la damaĝo estus malpli granda. La maro ne devas esti sterkejo!

Proksime de tie, la laboroj por la Banloko komenciĝis kaj post 24 monatoj ĝi ekfuncios. Multaj Ĥiĥonanoj emas uzi ĝin. Konvenas ke la prezo de tiuj servoj estu reale moderaj. Ambaŭ laboroj, tiuj de la Akvario kaj la Banloko, kvankam proksimaj inter si, altiros multe la turismon al nia urbo. Mi sidis kun *Boris* sur benko de kie oni vidas ambaŭ areojn de tiuj konstruaĵoj. Eĉ ties

nomoj estas belaj, Banloko kaj Akvario!

Mi fantazias kaj pensas pri la Okcidenta strando post du jaroj, plena da banantoj kaj promenantoj aŭtoktonuloj kaj fremduloj, ĝuante la allogaĵojn de la novaj instalaĵoj.

Dank' al la Banloko, Ĥiĥono senĉese rekuperas aktivecon, jam iniciatita, antikve, de niaj romaj parapatroj, en la unua jarcento (p.K) per sia termobanejo kaj sia religia fervoro al la diino Fortuna Balnearia. Reprenu ni, do, la sanajn morojn de kiuj ni estis senigitaj tro da tempo.

Verkis: *OPPIDUM NOEGA*



Iu rakonto de Paulo Coelho

Iu homo, sia hundo kaj sia ĉevalo iradis tra iu vojo.

Kiam ili pasis apud granda arbo, falanta fulmo subite mortigis ĉiujn ilin.

Sed la homo ne tuj perceptis ke li estis jam forlasinta ĉi tiun mondon kaj daŭrigis sian iradon kun siaj du dombestoj; foje okazas ke la mortintoj dum iom da tempo ne konscias pri sia nova situacio.

La vojo estis tre longa, suprenirante, la suno tre varmis, ili estis ŝvitantaj kaj soifantaj. En iu voj-kurbo ili vidis luksan pordegon, tute marmora, kiu kondukis al iu placo ore pavimita, en kies centro troviĝis iu fonto el kiu elfluis cristal-klara akvo. La piedmarŝanto adresiĝis al iu homo kiu estis gardante la enirejon.

- Bonan tagon- li diris.

- Bonan tagon- respondis la gardisto.

- Kiel nomiĝas ĉi tiu bela loko?

- Ĉi tio estas la ĉielo.

- Ho, bone ke ni alvenis al la ĉielo, ĉar ni tre soifas.

- Vi povas eniri kaj trinki tion da akvo kion vi volus- Kaj la gardisto indikis la fonton.

- Sed ankaŭ mia hundo kaj mia ĉevalo soifas.

- Mi bedaŭras sed ĉi tie ne estas permesata la enirado de la bestoj.

La homo tre afliktis, ĉar li soifis multege, sed ne volis triki li sola; li dankis al la gardisto kaj daŭrigis la marŝadon.

Post supreniradi dum plua longa tempo, tre lacigitaj ili alvenis al alia loko kies enirejo konsistis el iu olda pordeto kondukanta al iu ter-vojo ĉirkaŭita de arboj. Sub-ombre de iu el tiuj arboj kuŝis iu homo, kun la kapo kovrita per ĉapelo, eble dormanta.

- Bonan tagon- diris la marŝanto.

- La homo respondis per kap-movo.

- Ni multe soifas: mi, mia ĉevalo kaj mia hundo.

- Estas iu fonto inter tiuj rokoj- diris la homo. Ĉiuj vi povas trinki tiom da akvo kiom vi volus.

La homo, la ĉevalo kaj la hundo adresiĝis al la fonto kaj estingigis sian soifon.

La marŝanto reiris por danki al la homo.

- Vi povas reveni ĉiam kiam vi volus- respondis li.

- Nu, sed, kiel nomiĝas ĉi tiu loko?

- Ĉielo

- Ĉu Ĉielo? Sed la gardisto de la marmora pordego diris al mi ke tio estis la Ĉielo!

- Tio ne estas la Ĉielo, ĝi estas la Infero.

La marŝanto restis perpleksa.

- Vi devus malpermesi ke oni uzu vian nomon! Tiu ĉi falsa informo povas provoki grandan konfuzon!

- Tute ne!. Verdire tio tre favoras al ni. Ĉar tie restas ĉiuj kiuj kapablas forlasi siajn bonajn amikojn.



5a Centjaro



La 21a de majo de la jaro 1506 mortis, en iu modesta loĝejo en la hispana urbo Valladolid, iu homo, proksimume 55-jaraĝa, al kiu estis asignita la titolo: Admiralo de la Oceana Maro, speciale kreita por li fare de la tiamaj hispanaj gereĝoj, la t.n. "Katolikaj Gereĝoj", Elizabetino de Kastilio kaj Ferdinando de Aragono. Kiam ĉi-jare oni celebras la 5an Centjaron de la morto de tiu homo, Kristoforo Kolombo, multaj landoj emisias, kiel partopreno en tiu celebrado, novajn poŝt-markojn, kiuj aldoniĝas al la multaj jam eldonitaj ĝis nun pri tiu persono kaj ties prodaĵo: la malkovro de la Amerika kontinento. Sed sendube li estus forrifuzinta ĉi lastan atribuaĵon. Erare, li ne pretendis esti malkovrinto de nova kontinento. Li bazigis sian meriton kaj sian gloron sur la pretendo esti malferminta novan, malpli longan, vojon de Eŭropo al la orienta marbordo de Azio. Fakte, tia estis la celo de sia mara entrepreno. En la sekvaj paĝoj ni trastudos, eĉ se iom supraĵe, la biografion de tiu homo, kiel kontribuo nia al la celebrado de la Kvina Centjaro de lia vivo-fino. Multaj libroj kaj biografioj kaj eĉ filmoj dediĉiĝis al tiu persono kaj siaj mar-vojaĝoj, ĉefe la lastaj kvar al la nova kontinento, sed la verkita materialo pri tiuj temoj ne abundas en Esperanto. Ni volas modeste kontribui pleni tiun mankon.





Kristoforo Kolombo laŭ Salvador de Madariaga

En la jaro 1484, proksimume, venis el Portugalio al Kastilio iu homo eble pli stranga ol fremda, kiun Bernáldez, la kronikisto de la Katolikaj Gereĝoj, priskribas tiele: «Homo el Ĝenovio, komercisto pri presitaj libroj... kiun oni nomis Cristóbal Colón, alt-talenta homo, kvankam ne tre instruita tre lerta pri kosmografio kaj geografio». Akompanadis lin iu sia filo, ankoraŭ infano, kiun li nomadis Diego, kaj iris al Palos, kiu jam tiam estis haveno el la plej aktivaj en la andaluzia marbordo, kaj el tie li adresiĝis al la Rábida-monaĥejo, kie restis lia filo kaj ŝajnas ke li tre simpatiis kun la tieaj monaĥoj. La kuracisto de la monaĥejo, García Fernández, deklaris poste en iu juĝ-proceso ke «iu monaĥo kiu nomiĝis frato Johano Pérez, jam forpasinta, deziris internaroli kun la menciita Cristóbal Colón kaj, vidinte en li signojn de fremdeco, demandis kiu estis li kaj el kie li venis, kaj tiu Cristóbal Colón diris ke «li venis el la Kortumo de Lia Alteca Moŝto» (t.e. la reĝo de Portugalio).

Oni tuj perceptas la ĉefan trajton de tiu karaktero: ia diskretemo kvazaŭ de kalmaro, kiu disradias mallumon anstataŭ lumon. Pri si mem, konkrete, li rivelas kiel eble plej malmulte; tiom malmulte ke lia dua filo, Ferdinando, ne kapablis diri kie estis naskiĝinta lia patro, en sia verko li esprimas la opiniön de kelkaj aŭtoroj, kaŝas la sian (se vere li havis tian) kaj komentante alies erarojn, li diras ke ili ne estas strangaj «en ĉi tiu kazo kiu estas sekreta».

La mistero, kvazaŭ brumo, ĉirkaŭas la figuron de ĉi tiu stranga homo; sed tra la brumo oni perceptas la

emanado de iu forta personeco. Las-Casas, kiu konis, se ne lin mem, jes ja siajn fratojn kaj filojn, lasis al ni iun bonan priskribon pri li: «Li pli estis alt-ol mez-statura, havis longan kaj imponan vizaĝon; aglan nazon; verde bluj okuloj; blank-kolora haŭto. kun tendenco al intensa ruĝeco; la barbo kaj hararo estis blondaj, kiam li estis juna, ĉar tre baldaŭ, pro troa penado, fariĝis grizaj; li estis gracia kaj gaja, ĝentil-parola... elokventa kaj glora en siaj entreprenoj; li estis modere serioza kun la nekonataj, aŝtala kun la proksimuloj, milda kaj plaĉa; kaj tiele li kapablis vekti simpatian al ĉiunj kiuj lin vidadis».

Iuj el la trajtoj de ĉi tiu priskribo koncernas al la Tre Alt-ranga Sinjoro kiun Colón fariĝis poste; sed tiu homo kiu iradis de loko al loko promesante alt-sonajn malkovraĵojn preze de privilegioj same alt-sonaj kaj eĉ eksterordinaraj, kutime estis ne tiom preta al malfermiĝo. Same ol ĉiu persono streĉa kaj potenca, li kutime impresiigis la ceterajn per iu notinda ensemblo da kvalitoj kaj difektoj. Modesta, tamen li estis orgojla; sincera, tamen li estis discreta; kuraĝa, tamen li estis timema; obstina, tamen li estis lerta; brava, tamen li estis hezitema; ruza, tamen li estis neprudenta. Sed tio kio plej impresiigis siajn samtempojn estis sia firmeco mergi en neprecizecon kaj opakecon ĉion rilate al sia persono kaj al la celo kiu pelis lin al Hispanio.

Tiel multe li sukcesis pri tio ke ankoraŭ nuntempe, post kvin jarcentoj, oni debatas inter la historiistoj pri kiu estis li kaj el kie li venis. Ne decas remalfermi la debaton ĉi tie; sed eĉ se nur por skizi profilon

de tiom mistera persono, endas klare poziciigi pri sia origino kaj identeco. Ne povas esti konsiderita kiel vera biografio de Kolombo iu ajn priskribo, kiom saĝa gi estus aŭ ĝi konsiderus sin, kiu akceptus ambaŭ datum-grupoj pri lia vivo, kiel nekongruaj, sen almenaŭ intenci akordigi ilin en iu konsista ensemblo; car, per si mem, ili estas sen-sencaj.

Kolombo estis ĝenovano; sed li skribis nenion en la itala lingvo, sed ĉiam, esceptante ion en la latina, en la hispana lingvo; lingvo en kiu li skribadis al siaj amikoj ĝenovanoj, al Sian fratoj ĝenovanoj, al la Banko de Ĝenovo kaj ec al si mem, ĉar eĉ antaŭ lia veno al Hispanio, li kutimis noti siajn librojn, ec la

ital-lingvaj, en la hispana lingvo. En mia *Biografio de Cristoforo Kolombo* mi proponis kiel labor-hipotezo ke Kolombo apartenis al familio hispan-juda instalita en Ĝenovo eble unu jar-enton antaŭ lia naskiĝo. Ĝis nun, mi legis neniun seriozan argumentadon kontraŭ ĉi tiu tezo; sed multajn, kaj tre



bonajn, ĝiafavore. Jen ĉi tie unu el ili: laŭ la doktoro Cecil Roth, kiu ĝis sia morto instruis pri hebrea historio en la Universitato de Oxford, la nomo *Colón*, kiun la malkovrinto adoptis kun speciala obstino post lia sukceso, estis ĉiam tiu kiun uzadis la italaj judoj kies familia nomo estis *Colombo* kiam ili skribadis per la hebrea alfabeto. En Hispanio, Kolombo subskribadis (laŭ la datoj): *Colombo* kiam li alvenis al Portugalio, *Colom* kaj *Colón* en Portugalio, *Colomo* kaj poste *Colón* en Kastilio. Kaj kiam oni akceptis lian planon, definitive *don Cristobal Colón*.

En tio kio selvas, do, mi akceptos kiel fakton ke Kolombo estis iu hispana judo; kaj en lia karaktero oni devos reliefigi tri judajn trajtojn: la profetisma sento, la konvinkiĝo esti elektita de Dio por homa universala tasko, kaj iu spontana kontraktema teniĝo en ĉio kion li faris, pensis kaj sentis.

*

La unua el ĉi tiu tri trajtoj de sia karaktero tiom estis forta ke oni povas diri ke li malkovris Amerikon pli laŭ profetaĵo ol laŭ astronomio. Tiel deklaras li mem. En la jaro 1502, li skribis al la Katolikaj Gereĝoj: «Mi jam diris ke por la plenumado de la entrepreno de Induĵoj ne utilis al mi racio, nek matematiko nek mondo-mapoj: simple plenumiĝis tio kion diris Jesaja». Li aludas Jesajan ĉapitron 11an,

versajon 11an, «En tiu tempo la Sinjoro denove etendos Sian manon, por akiri la restaĵon de Sia popolo, kiu restis de Asirio kaj de Egiptujo kaj de Partio kaj Etiopujo kaj de Elam kaj de Ŝinar kaj de Ĥamat kaj de la Insuloj de la Maro». En tiuj vortoj de Jesaja apenaŭ estas io aplikebla al li, sed saĝa kapo duonvorton komprenas, kaj sufiĉis al li tio de la Insuloj de la Maro por sin senti aludita de la profeto.

Sed lia konfido pri la profetoj de la Malnova Testamento kutime estis pli konkreta. Por liaj kalkuloj pri la mezuro de la Tero, bazo de lia tuta plano, eĉ se li prikonsideras la opinion de la antikvaj kosmografoj

kiel Marino kaj Ptolomeo kaj de lia samt-empnato Toscanelli, la plejsupera aŭtoritato por li estas Ezra, profeto postlasita de la Eklezio inter la bibli-aj apokrifoj. Ezra diras ke *la mondo estas en ses partoj seka kaj unu parto maro*, kaj tial ke diras tion iu profeto, estis por Kolombo nedudebla vero. Ja, Ezra en sia kv-ara Libro, ĉap. 6a ne-

rekte aludas la temon en du paragrafoj kiujn li dediĉas al la Kreado. En la 42a: «En la Tria tago vi ordonis la akvojn kuniĝi en la sepan parton de la tero, kaj vi sekigis la ses partojn, rezervante ilin por ke iuj el ili servu al vi fajne plantitaj kaj kultivitaj»; kaj en la 47a: «En la Kvina tago vi diris al la sepa parto en kiu la akvo estis akumulita, ke ĝi nutru bestojn, birdoj kaj fiŝoj». Por Kolombo aserto tiel farita de profeto de la Malnova Testamento tiom validis kiom hodiaŭ por scienculo la respondo de sia komputilo. Kolombo, do, verdiris asertante ke utilis al li la profetaĵo pli ol la kosmografio por trovi Induĵon kaj Cipangon, t.e. la orienta marbordo de Azio kaj Japanio, ke estas tio kion li kredis malkovri.

Certe ke la teksto de Ezra estas neniue profetaĵo, ĉar ĝi nur rememoras al la Sinjoro tion kion li faris en ĉiu el la sep tagoj kiujn daŭris la Kreado; sed, nu, ĝi estis teksto de profeto, ec se ne akceptita de la Eklezio, kaj tio sufiĉis al Kolombo por esti certa ke la meridianoj ne kuraĝus kontraŭi tiom aŭtoritata voĉo (far de kiu, ni vidos poste) kion ne forgesis mencii en sia tre man-tuŝita kaj marĝen-skribita ekzemplero de sia preferita libro *Ymago Mundi*, de la franca kardinalo d'Ailly (kie li estis leginta tion pri la ses partoj sekaj kaj unu mara), «pruvante» ke Ezra estis profeto, ĉar estis tio kio gravis kaj ne la «matematiko kaj la mondo-mapoj», ĉar, se ne estus profeto

Ezra, ĉi-ties opinio pri la larĝeco de la Océano gravus nenion por Kolombo. Do, li dediĉas longan noton «pruvi» ke ĝi vere esti tio kaj finas per ĉi tiuj vortoj: «Sed ĉi tiu profetaĵo ne estas akceptata de la kondamnindaj judoj; tamen ekceptis ĝin la senombraj inter ili kiuj kredis je la Evangelioj... La kondamnindaj judoj mem konsideras Ezran kiel kanona aŭtoritato».

Nu, en lia epoko, kiam unu persono emis surstrekri la linion disigantan la kristanon el la judo eble temis pri malnova kristano; se, male, kion li/ŝi surstrekis estis la limon inter la judo kiu daŭre restas fidela al la leĝo de Moseo kaj la judo kiu estis «akceptinta la Ev-angeliojn», preskaŭ certe temis pri iu konvertito. Tiele klarigeblas tiuj tri judecaj trajtoj de Kolombo kiujn mi komentas.

Mi atentigas pri tio ke la unua el tiuj trajtoj estas la profeta sento; kaj tiurilate oni devas rimarki ke por Kolombo, kondiĉe ke la profetaĵo konvinku lin, ne multe interesis al li prikonsideri la akreditilojn de la profeto. En la Dua Akto de *Medea*, la tragedio verkita de Seneko, li trovis iun pecon kiu tre profunde impresiigis lin:

*Venient annis
Saecula seris quibus oceanus
vincula rerum laxet: et ingens
pateat tellus: Tiphysque naves
detegat orbes: nec sit terris
Ultima Thyle.*

Vortoj kiujn Kolombo mem tradukis (ne forgesante porti akvon por lia supo da insuloj): «venos la tardaj jaroj de la mondo certaj tempoj en kiuj la oceana maro lozigos la ligiloj de la aĵoj kaj malfermos iun grandan teron kaj nova maristo kiel tiu kiu estis gvidanto de

Jasono kiu nomiĝis Typhyso malkovros novan mondon kaj tiam jam ne plu estos la insulo Thule la lasta tero». Ne estas necese diri ke Kolombo sin konsideris persone aludita en ĉi tiu profetaĵo.

Estas facila la transiro de ĉi tiu unua judeca trajto de Kolombo –lia profeta sento–; al la dua, sia kon-



vinkiĝo esti elektita de Dio por iu altsignifa misio. En kio, almenaŭ, ŝajnas ke li ne eraris. Unualoke, diras Seneko tre klare; sed sugestas ankaŭ Jesaja, (ĉapitro 49a, versajoj 1 al 6) «mi faros vin lumo por la nacioj, por ke Mia savo etendiĝu ĝis la fino de la tero». Sed, kompreneble, oni devas esti Kristoforo Kolombo por tiamaniere elpreni ĉi tiun frazon el sia kunteksto, subinflue de tiu esprimo «la fino de la

tero», kiu, laŭŝajne, fascinis lin kaj kvazaŭ devigis lin sin senti aludita, sed ĉi tiuj kaj ne aliaj estis la fontoj de lia memfido kaj aplombo; sin scii elektita, nomumita, de la Sinjoro kiu antaŭskribas la historion de la homoj.

Pro tio samtempe lia modesteco kaj lia orgojlo. El la du, estis pli reala kaj spontana la orgojlo; la humileco pli estis masko trudita ĉu de la disciplino, ĉu de la ruzo. La orgojlo devigis lin postuli de tiuj potencaj gereĝoj Elizabetino kaj Ferdinando, preze de la malkovro kiu li estis faronta, supermezurajn, kiŝhotecajn kaj kavalirecajn privilegiojn: nobeleco, titolo *don*; la rajto surporti orajn spronojn; la titolo kaj privilegioj de Admiralo de la Oceana Maro (preskaŭ reĝa titolo) kaj Vicreĝo, devante esti ĉio ĉi-tio heredaĵo de lia familio. Pri ĉi-tiuj kondiĉoj, Kolombo cedis neniam. Li persistis en sia teniĝo antaŭ la reĝo kaj la reĝino, kaj ankoraŭ en januaro de la jaro 1492, anstataŭ cedi, li foriris el Granado ĉagren-maniere kaj por ĉiam. Jam distance 8 mejlojn el la urbo atingis lin iu kuriero de la gereĝoj por anonci al li ke estis ili kiuj cedis al la obstina petanto. Venko rezultanta, krom

el lia firmeco, ankaŭ el tri potencaj amikoj kiujn li havis en la Kortumo: la arĉiepiskopo Deza, estonta ĝenerala inkvizitoro; Cabrero, ĉef-servisto de la reĝo, kaj Sant-ángel, reĝa trezoristo –tri konvertitoj.

Ĉi tiu orgojlo de Kolombo estis kaŭzo de multaj memorindaj scenoj de sia vivo, el kiu mi volas rakonti iun ĉar ĝi tiom elvokas donKihoton ke indas sindemandi ĉu Cervantes ne estis pensinta pri li kreante la manĉan Heron. Eltrovitaj «la Indujoj» ĉar tiel interpretis li sian malkovron, Kolombo rapidegis reveni al Hispanio Ĝuste en la plej malgranda el la tri karaveloj

la *Niña*, ĉar la *Santa María* estis droninta en haveno, pro neglekto, kaj la *Pinta* estis foririnta subgvide de Pinzono. En ĉi tiu nukso-ŝelo 51 futojn longa, li alvenis al la elfluejo de la Tajo-rivero sur la kresto de ega tempesto, sed sufiĉe kontenta pro tio ke li povis sentigi la reĝon Johano de Portugalio ĉion kion li perdis ne aŭskultinte lin antaŭ 8 jarojn, permesante lin iri rakonti la aferon de la insuloj al la gereĝoj de Kastilio kaj Aragono.

Tiel, do, la ĵus nomumita admiralo de la oceana maro daŭre navigadis suprenirante tra la Tajo-rivero ĝis Rastelo, proksime al Lisbono. Tiam troviĝis tie iu portugala ŝipo, «tiu plej armita per kanonoj kaj ceteraj armiloj, kia neniam antaŭe estis vidita»; kies kapitano sendis la armitan boaton al la karavelo kun ordonoj alporti Kolombon al la ŝipo por informi pri si cele de komuniki al la reĝo de Portugalio. Tion aŭdinte, don Kiĥoto Kolombo kondukis tiel kiel raportis pri tio Cervantes: «Respondis la Admiralo ke li estas Admiralo de la Reĝoj de Kastilio, kaj ne donas tiajn informoj al tiaj personoj, nek eliros el la ŝipo kie li troviĝas, (do, iu karavelo kiu preskaŭ ne estis eĉ tio) se ne estus devigita tion fari sub minaco de armita atako. Respondis la boatestro ke li sendu la oficiron de la karavelo; diris la Admiralo ke nek al oficiro nek iu ajn alia persono, se ne estus perfort-devigita, ĉar tiom valoris li sendi

alian personon kiom iri li mem, kaj ke tia estis la kutimo de la Admiraloj de la Kastiliaj reĝoj: prefere morti ol sin doni aŭ doni siajn subulojn.»

Ĉio-ĉi estas pura Cervantes-stila sinteno, sed ĝi okazis pli ol unu jarcento antaŭ la epoko de tiu verkisto. La stilo estas tiu de don Kiĥoto: «ĉi tiu estas la kutimo de la admiraloj de la reĝoj de Kastilio»; samkiel tiu eĉ pli suka: «ke li ne donas tiajn informoj al tiaj personoj nek eliros el la ŝipoj kie li troviĝus...» Tiu ĉi kategorigado laŭ rango kaj digno de


la subjekto, kiu kongruas en la hispana karaktero kun la kategorigado laŭ kvalito kaj atributoj de la objekto, kiu kongruas kun la franca intelekto, ne povis esti pli okul-frapa; ĉefe prikonsiderante ke, se mia intuicio estas prava, tiel Kolombo kiel Cervantes estis jud-hispanoj.

Nu, en Kolombo montriĝas du aspektoj de la orgojlo: kiel trajto propra de sia persona karaktero, sed ankaŭ kiel pasio rezultinta kiel kompenso de la judo ofendita, humiligita kaj mistraltita okaze de la forigo. La forigo de la gejudoj el Hispanio okazis laŭ dekreto subskribita la 31an de marto de la jaro 1492. La subskribo

estis de Johann (Juan) de Coloma. Sekretario de la reĝo, judo laŭ patrina linio, kaj okazas ke Colomo estis la nomo kiun Kristoforo Kolombo uzis ekde 1480 ĝis 1492. La «Kapitulac-dokumentoj» inter Kolombo kaj la Krono estis subskribitaj la 17a de aprilo, kaj subskribis ilin ankaŭ Juan de Coloma; sed Kolombo jam subskribas sur ilin kiel Kristoforo Kolombo (Cristóbal Colón, en la hispana lingvo).

Tiel, do, la saman tagon de sia sukceso sur la papero, anonco de lia sukceso en la ter globo, Kolombo revenas al sia nomo laŭ la hebrea maniero.

Kiel sciante, Kolombo ekiris la faman vojaĝon la 3an de aŭgusto, duonhoro antaŭ la sunleviĝo, sed antaŭe li devigis ĉiujn siajn maristojn ensipiĝi la 2an. Nu, oni devas prikonsideri ke ĝuste tiu 2a de aŭgusto estis la fina tago de la eliro de la judoj elpelitaj el Hispanio. Kaj krome, Kolombo komencis sian taglibron de navigado sur ŝipe de la *Santa María* per iu letero al la Katolikaj Gereĝoj en kiu li diras: «Do, post la forigo de ĉiuj judoj el viaj reĝo-landoj kaj sinjor-landoj, en la sama monato januaro ordonis viaj reĝaj moŝtoj al mi ke kun la konvena ŝiparo mi adresiĝu al Hindujo; kaj por tio faris al mi grandajn favorojn kaj nobeligitis min tiamaniere ke de tiam mi nomiĝu



Don, kaj estu Plejalta admiralo de la Oceana Maro kaj Vicreĝo kaj dumviva Guberniestro en ĉiuj Insuloj kaj Firma Tero.» Pro kio menci la forigon de la judoj, tiom ne oportune ke Kolombo devis antaŭenigi ĝin preskaŭ tri monatojn? Oni povas pensi ke li havis en la menso iun duon-penson aŭ senton kiu igis lin diri: «Vi forigis kaj humiligis miajn fratojn, sed vi devis adopti kaj levigi min».



Konfirmas tion la letero kiun li skribis al la gubernistino de la princo don Johano, kaj kiun intence publikigis poste lia filo Ferdinando kiel konkludo de sia ĉapitro pri la «mistero» de la deveno de lia patro: «Mi ne estas la unua admiralo de mia familio, oni asignu al mi la nomon kiun oni volu, ĉar ĉiukaze Davido, tre saĝa reĝo, estintis ŝafin-pastisto, kaj poste li fariĝis reĝo de Jerusalemo; mi estas servisto de tiu sama Sinjoro kiu metis Davidon en tiun postenon.»

Sed en Kolombo, la humileco foje estis ilo tiom utila kiom la orgojlo, se ne pli. Kiam lia ne-kapablo kiel ĝenerala guberniestro okazigis al li la humiligon esti objekto de esploro fare de la servisto de la reĝo, li decidis reveni al Hispanio kaj apelacii antaŭ la reĝo kaj la reĝino; sed cele de protekti sian orgojlon, li humiligis sin mem pli ol tio kion humiligis lin la reĝaj servistoj, ĉar nur Kolombo povis humiligi Kolombon; tiamaniere ke li elŝipiĝis en Kadizo jam ne kiel Admiralo kaj Vicreĝo, riĉe vestita kaj servita, sed kiel humila homo kun mal-aranĝita barbo, minca vizaĝo, plorigaj okuloj, «portante vestaĵojn kun koloro de la kostumo de frato de la ordeno de Sankta Francisko de la Observado, kaj ŝnureto de Sankta Francisko pro pieco.»

Kolombo plenkonsciis pri siaj difektoj, kiuj estis kvazaŭ la reverso de sia genio, kaj, tial, de la pravo de la Katolikaj Gereĝoj kiam, kiel specialistoj kiaj ili estis, fine konsideris lin ne-kapabla reganto. Sed, laŭ lia kutimo, li intencis eliri de supre, ne de malsupre. Do, en la karavelo en kiu li revenis katenita propravole, ĉar li volis ke la katenoj kiujn «la reĝo» surmetis al li en Sankto Domingo, estu «la reĝo» mem kiu demetu ilin en Seviljo, li skribis al la gubernistino de don Johano ĉi tiujn altsignifajn vor-

tojn: «Mi devas esti juĝata kiel Kapitano kiu de antaŭlonge ĝis hodiaŭ surportas la armilojn ne lasante ilin eĉ unu horon, kaj kiel kavaliro de konkero kaj ekzerco kaj ne de intelekto, krom se temus pri grekoj aŭ rominaoj aŭ de aliaj modernaj el kiuj estas multaj kaj tre nobelaj en Hispanio, ĉar alie estus al mi granda ofendo.»

Estas multe admirinda en ĉi tiu deklaro. Unue, la kiĥoteca stilo unu jarcento antaŭ la naskiĝo de don Kihoto, ne nur en kio koncernas al iu arkaikaj formoj de la lingvo, sed ankaŭ pro la armo de la animo tiom simila en ambaŭ; poste, tiun distingon kiun li faras, kaj kiun farus ankaŭ don Kihoto, inter la literatura intelekto kaj la ĵura, t.e. inter la literaturistoj kaj la advokatoj, nuancita de la karakteriza misvolvo de la agemaj viroj kontraŭ la ĵuristoj kiu baras al ili la liberon de la glavo; kaj tiele li forglitas supren el la riproĉo ke li ne scias pri regado ĉar li estas kapitano kaj konkeranto, kaj oni devas ne veni al li kun leĝoj. Sed en tiuj malmultaj linioj li montras ion pli profundan: kaj estas la *naska* karaktero de lia energio, kiu movas nur la *komencantajn* aferojn, kies noveco kaj naskiĝo mem ekscitas la volon; sed kiam tiuj aferoj komencas esti malpli novaj, pli konataj kaj normalaj, ili enuigas kaj malaktivigas la volon de homo kia li; kies ne-elĉerpita energio pelas lin serĉe de aliaj novaj kaj naskiĝantaj entreprenoj.



Tiamaniere Kolombo, ĉesante kiel vicreĝo de la Indujoj fare de la reĝoj, sin turnas al la Sankta Lando kaj malkovras ke urĝas liberigi ĝin el la turka tiraneco; por kies celo li konsultas –kion?: nu, nenion pri historiaj, geografiaj aŭ astrologiaj libroj; sed la profetaĵoj. Kiel fundamento por sia nova misio, li kolektis, do, antologion da profetaĵoj pri la liberigo de Jerusalemo. Denove ni renkontiĝas kun lia profeta sento, lia konvinkiĝo esti homo electita por iu misio, lia orgojlo.

*

Malpli pitoreska, lia tria judeca trajto tiom superstaras kiom la du unuaj laŭlonge de lia tuta vivo. Ĉi tiu trajto estis iu forta sento de kontraktemo de la agado, iu konstanta sinteno de *do ut des*. Tio evi-

dentigās jam ekde la negocad-komenciĝo kun la reĝo don Johano de Portugalio; kaj baldaŭ konstatigis ankaŭ en la traktado kun la hispanaj monarĥoj. Krom la alt-sonaj kaj kiĥotecaj kondiĉoj kiujn li trudis al Elizabetino kaj Ferdinando, Kolombo ne ĉesis insisti en aliatipaj klaŭzoj kiujn oni povas konsideri Sanĉopanzecaj. Tiel en tiu ĉi unua kontrakto kiel en la sekvintaj, ĉiam aperis komerc-tipaj kondiĉoj, kiel, ekzemple, la dek procento el ĉiu transakcio kiun oni efektigos kun la teritorio de lia vic-reĝeco. La afero ne estas ĉu oni povas imputi al li sordidecon, avarecon aŭ koruptecon. Tute ne. En li tio estis kvazaŭ ia ekvilibro. Se mi donas al vi iun mondon, kion donos vi al mi? Krome, li ĉiam submetas la gajnon al la honoro; kaj, kiel li pruvis dramece en *Santa Fe*, apud Grenado, li ĉiam estis preta rompi antaŭ ol cedi. Aliflanke, kiel ĉiu agema homo y simile en tio al ĉiuj grandaj hispanaj konkerantoj, la mono por el li estis nura ilo de povo kaj grandeco, kaj plia agado.



Tial oni vidas ke tiu kontraktema sento lia same vigla montriĝas en liaj traktoj kun la Ĉiopova. Ŝajnas ke Kolombo vivis en konstanta komunikado kun la Sinjoro – tiome ke ankaŭ tiu ĉi trajto de lia karaktero povas esti konsiderata kiel judeca-, ĉar li elvokigas kiel neniu alia eŭropano la preskaŭ familiecon kiun oni vidas en la Biblio inter la grandaj hebreaĵ gvidantoj kaj Jehovo. Sed Kolombo multe iras preter ili, kaj eĉ utiligas la Sinjoron por humiligi la reĝojn, antaŭ kiuj tiom devus li humiligi sin mem. En lia letero el Jamajko (la 7a de junio de 1503), ĉefverko rilate al la stilo, spontaneco kaj grandeco, ĉi tiu homo kiu troviĝas tie retenita de la natur-elementoj, en senespera situacio, skribas al la gereĝoj: «Lacigita, mi dormiĝis ĝemante: mi aŭdis iun pian voĉon kiu diris: Ho! Stulta kaj tarda kredi kaj servadi vian Dion, Dio de ĉiuj! Kiom pli ol viafavore li faris favore al Moseo aŭ Davido, liaj servantoj? Ekde via naskiĝo, li ĉiam tre zorgis pri vi. Kiam vi atingis la konvenan aĝon, li mirinde dissonigis vian nomon en la Tero. La Induĵoj, kiuj estas parto el la mondo, tiom riĉaj teroj, li donacis al vi; vi disdividis ilin laŭ via plaĉo kaj li donis al vi povon por tion fari...»,

kaj poste ĉi tiuj vortoj: «Kaj oni obeis vin en tiom da teroj, kaj inter la kristanoj vi trovis tiom da honora famo.» Ĉu ne la konvertito deklariĝas ĉi tie ankoraŭ fidela al Moseo? Ĉu ne li konstruas ĉi tie per bibliaj materialoj pledon kontraŭ la Katolikaj Gereĝoj? «Kion li faris favore al la pli alta Isreala popolo kiam elsavis ĝin el Egiptujo?» (pli alta ol kiu popolo?) Ĉu ankaŭ ne favore al Davido kiun, estante ŝafin-pastisto, faris lin reĝo de Judujo? «Turnu vin al li kaj rekonu jam vian eraron... la privilegioj kaj promesoj kiujn Dio donas, li ne rompas ilin, nek diras, ricevinte la servon, ke ne estis tia lia intenco, kaj ke oni interpretas alimaniere...»



Ĉu eblas pli karakteriza paĝo de la orgojlo de la humiligita kiu fariĝas humiliganto? Sed nu, ĉi tiu orgojlo, estis prava ĝi? Ĝis ioma grado, jes. Lia vera grandeco devas esti vidita la 9an de septembro de 1492, la tagon kiam ende la tri karaveloj ĉesis esti videbla la firma tero kiu restas malsupre kaj ĉiuj en la ŝipoj sin sentas ne-sekuraj, sed li daŭre navigadis sentime, tra la senlima, nekonata oceano, dorse al la tero kaj ties sekuraj havenoj. Tiutage Kolombo estis la Moseo de la Oceano, kondukante post si la popolon al la promesita lando. Sed, same ol Moseo, kiun li tiom multe citadis, Kolombo ne vidis la promesitan landon. Li mortis plenkonviktita esti malkovrinta iun novan vojon al Hinduĵo kaj Japanio. La okuloj de lia spirito ne vidis Amerikon.

En ĉi tiu Esperanta traduko de la esejo de Salvador de Madariaga prezentiĝis la kutima problemo de ĉiu tradukanto: la personaj kaj geografiaj nomoj. Kiel eble plej, oni uzis ĉi tie la esperantigitajn nomojn: Kristoforo Kolombo, Elizabetino, Ferdinando, Johano... sed estis devige uzi la hispanlingvan formon, ĉefe por la kazo de Kolombo, en tiuj partoj de la esejo kiuj temis, precize, pri la diversaj formoj de la nomo de la malkovrinto kaj ties evoluado laŭlonge de lia vivo.

Alia estas la kazo: Hinduĵo-Induĵoj. La unua formo estis uzita kiam temis pri la Azia lando, kiun celis la vojaĝoj de Kolombo, kaj la dua kiam temis pri la reale malkovritaj teroj, kiujn li mem, pro la fama eraro, nomigis tiamaniere.

Kvar ŝip-vojaĝoj kiuj ŝanĝis la mondon



El la kvar famaj ŝip-vojaĝoj de Kolombo al la novaj teroj kiujn li malkovris, la plej decida, komprenebla, estis la unua. Ĉiuj kvar kune utilis por ke Eŭropo ekkonsciu pri la amplekso kaj graveco de la horizonto kiu malfermiĝis al ĝi okcidenten. Baldaŭ sekvis aliaj vojaĝoj tiudirekten, kaj ne nur hispanaj, kaj baldaŭ post la morto de Kristoforo Kolombo estis jam evidente ke temis ne pri la orienta maobordo de Azio sed pri nova kontinento. Nova Mondo, ĝi estis nomita, kaj Eŭropo, aŭ pli konkrete okcidenta Eŭropo, disetendiĝis tra tiuj novaj teritorioj kaj tiuj aliaj malkovritaj de tiam, ankaŭ Oceanio.

Por kompreni la gravecon de tiu paŝo oni devas atenti pri ties sekvoj. Hodiaŭ la superdominanta civilizacio en la mondo estas la disvolvigita en tiu okcidenta Eŭropo kiu tiam konkeris Amerikon. Tiu civilizacio estis rekte heredinta de la Romia Imperio kiu kolapsis en la 5a jarcento de nia erao. Hodiaŭ tiu civilizacio staras ambaŭborde de la Atlantika oceano, kaj de tie dominas, kaj super-regas la tutan mondon, kaj disradie etendiĝas, foje eĉ agreseme, domaĝe al la kulturoj de la ceteraj popoloj en la tuta terĝlobo.

La disvolviĝo de tiu civilizacio estis sufiĉe kriza, kaj problema: dum pluraj jarcentoj ĝi estis atakita, prirabita kaj serioze minacita de normandoj kaj la arab-devena muzulmana kulturo en la sudo. Nur mirakle ĝi saviĝis el la mongola hordo kiu invadis kaj ruinigis orientan Eŭropon en la 13a jarcento. Fine,

pro la falo de Konstantinopolo sub la povo de la turkaj otomanoj restis barita, fermita la ekspansio kaj la komercado de la popoloj de tiu kulturo kun Oriento. Ĝuste tiu ĉi lasta evento incitis la maristojn de la Mediteraneo kaj Atlantiko samkiel la marajn landojn de okcidenta Eŭropo serĉi alternativajn vojojn al Oriento. Portugalio iniciatis jam en 1486 la esploron de la atlantika marbordo de Afriko; la portugala maristo Bartolomeu Dias alvenis en 1487 al la suda ekstremo de tiu kontinento, kiu malfermas la vojon al Azio, kaj poste sia samlandano Vasco de Gama gvidis ekspediciojn al Hindujo tra tiu vojo. Sed tiam, jam en 1492, Kolombo, serve de Kastilio, lando ĵus sin-liberigita el la araba okupado, serĉis tiun vojon okcidenten kaj neatendite malkovris novan mondon.

Al tiu esplorado kaj konkerado de la mondo aldoniĝis poste aliaj nacioj de okcidenta Eŭropo: Francio, Nederlando kaj ĉefe Britio. Tiu epoko, do, signas la ek-leviĝon de tiu civilizacio kiu de tiam nehaltigebla suprenirais/as al la tutmonda superregado. Laŭlonge de tiu leviĝ-procezo tiu kulturo liberiĝis el la ligiloj de la penso pere de la Reformo, superis la inkvizician etapon, realigis la liberalajn revoluciojn kaj iniciatis la industriajn revoluciojn kaj iniciatis la industriajn revoluciojn. Hodiaŭ ĝi troviĝas en la etapo de la Scienc-teknika revolucio. Rigardante la trairitan vojon de tiu kulturo oni konstatas la gravecon de tiu paŝo de 1492.





La mult-vizaĝa homo

Multaj urboj kaj nacioj disputas sin atribuant esti la naskiĝloko de Kristoforo Kolombo, la malkovrinto de Ameriko, kaj estas ankaŭ dubo kaj pridisputado pri lia tombo. Sed la malakordo pri lia persono rilatas ankaŭ al lia bildo aŭ imago. Oni nomis lin “la mult-vizaĝa homo” kaj “la mil-vizaĝa homo” tial ke multaj artistoj el diversaj epokoj kaj landoj pentris prezentis lin laŭ tre diversa aspekto. Inter tiom abunda ikonografio, kiu estas la vera bildo de la fama navigisto? Ĉu eble neniu el ili? Antaŭ ĉio oni devas averti ke la Admiralo neniam pozis antaŭ pentristo; ĉiuj pentraĵoj pri li estis faritaj post lia morto, iuj el ili laŭlonge de la jarcentoj post lia vivo. Sed tamen, ja, estas iu pentraĵo kiu, pli ol la ceteraj, povas montri al ni la veran vizaĝon de Kristoforo Kolombo. Ĝi estas tiu pentraĵo kiu troviĝas en la Mara Muzeo, en Madrido, el kiu ni prezentas grandan bildon en ĉi tiu paĝo. Sed oni devas klar-



igi ion: tiu pentraĵo, anonima, estis farita en la jaro 1848, sed ĝi estas rekta kopiaĵo de iu portreto farita de Hernando Yáñez de la Almedina, kiu faris pentraĵon proksimume dudek jarojn post la

morto de la Admiralo, sed kiu estis koninta lin en la kortumo de la Katolikaj Gereĝoj; kiel sciante, la pentristoj havas fotografian memoron kaj scias esprimi sur la tolon ne nur la vizaĝajn trajtojn sed ankaŭ la karakteron de iliaj modeloj. Cetere, tiu ĉi pentraĵo trafas montras la aspekton de la fama maristo tia kia ĝi estis priskribitaj de samtempoj liaj kiel la kronikisto Bernaldez kaj pastro Las-Casas. Kurioze, ĉiuj portretoj de Kolombo montras lin senbarba sed oni pensas ke dum lia longa vivo kiel maristo en la Mediteraneo li estis barbulo kiel multaj tiuepokaj maristoj, tamen fine li alprenis tian aspekton por

lia navigado tra la reĝaj kortumoj de Portugalio kaj Hispanio, pli danĝera ol la navigado tra la sep maroj de la mondo.



70 jarojn poste

Ĝuste antaŭ 70 jaroj Hispanio troviĝis plenenmetita en civila milito kiu tiam estis daŭranta ankoraŭ preskaŭ tri jarojn. Ĝi estis la kvara frata milito en nia lando ekde la jaro 1700, do, averaĝe unu civila milito ĉiu-jarcente, krom du invadoj fare de la franca armeo, kelkaj revolucioj, multaj militistaj puĉoj kaj pluraj reĝimo-ŝanĝoj monarĥio/respubliko. Kiam, ĉi-tagoj, oni multe parolas kaj pritemas per la presaro pri la t.n. "historia memoro", konvenas precizigi ke la ĉefa instruo kiun nia popolo devas eltiri el tiu historio de la lastaj jarcentoj kaj speciale el la milito 1936-1939, estas la neceso forigi la militon kaj la perforton el la interrilatoj inter la geloĝantoj de ĉi tiu lando.

Plejmulte el la hispanaj familioj suferis la perdon de iu(j) el siaj membroj, ĉu dum la milito mem aŭ dum la sekvinta frankisma subpremado Ĉar se la milito estis tre sang-verŝiga kaj detrua, la plurdek-jara periodo de regado de la venkinto de tiu milito ne estis, precize, la plej dolĉa kaj milda kuracilo por nia popolo. En tiu periodo, ĉefe je ties komenciĝo, tre oftis la revenĝo kaj la subpremado al la venkitoj. La propra tiama regantaro rekonis ke inter la jaroj 1940 kaj 1943 pli ol 190.000 militkaptitoj pereis en la malliberejoj kaj koncentrejoj. Dume, proksimume kromaj 400.000 ekziliĝis.

Laŭlonge de preskaŭ kvardek jaroj post la milito tute mankis en Hispanio la politikaj rajtoj kaj liberecoj. Dum tiu tempo ĉiuj gehispanoj estis (sub)regatoj anstataŭ civitanoj. Kaj ĉio ĉi kun la fono de malriĉeco kaj malevoluiĝo de la lando, ties industrio kaj produktigaj fortoj. La elmigrado de gehispanoj, kiu estis kronika malsano de nia socio dum la lastaj jarcentoj, destine al Ameriko, pliakcentiĝis dum la frankisma periodo, ĉi foje, prefere, al la riĉaj industriaj landoj de okcidenta Eŭropo.

Rememori tion hodiaŭ, okaze de la 70-jara datreveno de la komenciĝo de la milito, ne celas ian ajn konto-reguligon. Al ĉiuj batal-protagonistoj de tiu milito multe estas necesa la pardono de siaj malamikoj kaj eĉ de siaj propraj kunbatalintoj. Plej grave estis ke tiu civila konflikto estis esprimo de granda rompiĝo en la hispana socio kiu de tiam restis dumlonge dividita; Fakte, multaj en nia lando opinias ke la nacia repaciĝo daŭre estas tasko ne tute plenumita.

Tamen nia lando kun optimismo vidiĝas survoje al tiu celo. Politikaj fortoj kaj partioj, kiuj dum la milita konflikto enkarnigis la emon kaj teniĝon de la batalantoj, alprenis poste planon kaj politikon celantaj la nacian repaciĝon kaj ludis, antaŭ tri-dek jarojn, decidan rolon en la paca politika transirado al demokratio.


La demokratio, libereco kaj civilaj rajtoj estis restarigitaj en nia lando, kaj nuntempe jam ne plu estas delikto en Hispanio havi tian aŭ tian politikan partiecon. Kompare kun antaŭ 70 jaroj, multe ŝanĝiĝis la situacio en tiu ĉi lando, kaj ne nur en la politika tereno: tre disvolviĝis kaj moderniĝis la agrokulturo, la industrio kaj ĝenerale ĉiuj ekonomiaj meĥanismoj. Se la hispana civila milito estis kvazaŭ la preludo aŭ prologo de la Dua Mondmilito kiu baldaŭ poste trafis preskaŭ tutan Eŭropon, hodiaŭ la paco regas ankaŭ en tiu kontinento, kiu antaŭmarŝas al sia unuiĝo, kaj Hispanio partoprenas en tiu Eŭropa Unio.

Kaj renversiĝis ankaŭ la senco de la hom-migrado: se antaŭ kelkaj jardekoj Hispanio estis produktanta kaj eksportanta de elmigrantoj, hodiaŭ ni ricevas la enmigrantojn venintajn el aliaj terzonoj. Kompreneble, ne mankas problemoj en nia socio, en mondo kiu havas grandajn problemoj ankoraŭ ne solvitaj. La menciita enmigrado en nian landon kaj en tutan Eŭrop-Union estas signo de mizero kaj malespero en aliaj lokoj. Kaj estas ankaŭ militoj; kiam oni verkas ĉi tiun artikolon daŭras ankoraŭ la militista okupado de Afganio kaj Irakio, kaj estas denove, en Meza Oriento, milita interfrontiĝo kiu pli kaj pli akiras la trajtojn kaj karakteron de kontraŭfrontiĝo de civilizacioj. Dume persistas la ekspluatado en Latin-Ameriko kaj aliaj kontinentoj, la mizero kaj malsato en Afriko, la internacia terorismo, la inter-etnia perforto en diversaj lokoj, la integrismo kaj religia fanatikismo...

Jes, ni ne vivas hodiaŭ en la plej bonstata mondo, sed nia lando, kadre de Eŭropa Unio, travivas sendube, la plej pacan kaj prosperan etapon de sia historio. Unuafoje post multaj jarcentoj, oni povas fieri esti hispano. Ke nia popolo sciu alfronti ĉiujn internajn kontraŭdirojn kun pli bona teniĝo ol antaŭ 70 jarojn, kaj ke kapablu esti solidareca kun la popoloj kiuj troviĝas en malfavora situacio en la nuna monda distribuo



65a HISPANA KONGRESO DE ESPERANTO



EL PUIG Valencio, de la 21a ĝis la 25a de Julio, 2006



La ĉi-jara Hispana Kongreso de Esperanto, kiu estis la 65a el tiurangaj E-kongresoj en nia lando, okazis en la valencia urbo **El Puig**, konkrete en la tiurba Kulturdomo, inter la 21a kaj la 25a de Julio, kun la ĉeesto de proksimume 60 gekongresanoj el 7 landoj. En la unua tago de la Kongreso, Rafael Peris Solaz prezentis sian filatelan ekspozicion kiu enhavis interesan kaj ampleksan kolekton da poŝmarkoj kun esperantista intereso. Alia ekspozicio en la sama tago estis tiu pri Irano kiun prezentis Aneta Będkowska, eksprezidantino de Pola Esperanto-Junularo, konsistanta el kolekto da belaj fotografaĵoj kiujn ŝi faris dum ŝia pasintjara vizito al tiu lando. Tiutage mem okazis iu el la turismaj vizitoj de la kongresmembroj, ili vizitis, en la sama urbo **El Puig**, la Monaĥejon de Sankta Maria, granda gotik-stila konstruaĵo de la jaro 1328 starigita far de la tiama reĝo Jakobo (Jaŭme) la Unua t.n. "la Konkerinto". En tiu monaĥejo estas speciale vidindaj la klostroj, la galerio de pentraĵoj kaj ĉefe la tie instalita Muzeo de la Pres-Arto, en kiu troviĝas ĉiutipaj presiloj kiel antikvaj el-lignaj presiloj, pres-



Monaĥejo de Sankta Maria de El Puig

tiparojn kaj maŝinoj el diversaj lokoj kaj epokoj, permane gravuritaj reliefoj...

Augusto Casquero, Prezidanto de Hispana Esperanto Federacio, gvidis kurson por progresintoj kies unuaj lecionoj okazis en tiu unua tago de la Kongreso. Tiuvespere, la sama Aŭgusto Casquero prezentis amuzaĵon: iu kvizo kreita de Toño del Barrio kiu, tamen, ne povis ĉeesti tiun akton.

Poste okazis la unua prelego de la Kongreso. Tiu de Alejandro Pareja pri la temo "George Orwell kaj ties rilatoj kun Lanti kaj Esperanto". Dum sia interesa prelegado li temis pri vivspertoj de la fama brita verkisto rilate al Esperanto.

La aŭtoro de "Besto-farmo", k. a., dum sia loĝado ĉe kunulino de la fondinto de Sennacieca Asocio Tutmonda (SAT), Eugenio Lanti, parenkulino sia, en Parizo iome malamis Esperanton tial ke en la familio de Lanti oni kutimis, kiel rigora normo, ĉiam paroli nur en Esperanto, kaj tio iome ĉagrenigis Orwell-n kiu ne kapablis kompreni kaj

esprimi sian penson en tiu lingvo. Sed li inspiriĝis en Esperanto, por sia verko "1984" por la fikcia lingvo Newspeak.

La lasta programero de tiu kongres-tago estis la kutima kunsido de la HEF-Estraro.

Sekvinttage, sabate la 22an, Jesuo de las Heras prezentis interretan paĝon kiun li demarŝas: "Gazetoteko Lanti". Tiu portalo, alirebla tra interret-adreso: <http://www.gazetotekolanti.com> provizas alirecon

al tra-reta kolekto da esperantaj gazetoj. Inter alie troveblas tie preskaŭ tuta kolekto de **Boletín** de HEF kaj completa kolekto de la bulteno **Kajeroj el la Sudo**, samkiel numeroj de aliaj E-periodaĵoj kiel **Popola Fronto**, **La Juna Vivo**, **La Suno Hispana**...

Tiu kolekto estas malfermata al la ricevo de la materialo kiun oni dezirus sendi al ĝi por ties publikigo. Post tiu akto okazis la Ĝenerala Asembleo de Hispana Esperanto-Federacio, en kiu oni pritemis la aferon de la demisio de la redaktoro de **Boletín**, Manuel Pancorbo, al kiu ne eblas plu okupiĝi pri tiu tasko. Tiu manko perceptiĝas jam en la fakto ke ĉi-jare estis ĝis nun eldonitaj nur du numeroj de tiu HEF-presorgano. Jorge Pavón sin oferis por tiu redaktora laboro kaj oni esperas ke povos esti eldonita tria numero de la revuo antaŭ la finiĝo de la jaro. Cetere, kaj ĝis la normaligo de la situacio, oni prikonsideris la eblecon, provizore sendi presitan kaj ankaŭ retan informilon al la membroj de la asocio.

Temante pri la celebrado de la 5a Centjaro de la unua eldono de la Kihoto, okazinta pasintjare en Hispanio, en kiu partoprenis ankaŭ la hispanaj gesperantistoj, la Asembleo gratulis al Toño del Barrio pro lia dediĉiĝo al la organizado de tiu partopreno, por kiu li atingis gravan ŝtatan subvencion por la Federacio.

Post la Asembleo de HEF estis la Solena Malfermo de la Kongreso, en kiu ĉeestis Sro Joan F. García i Félix, Urbestro de El Puig, kiu salutis kaj bonvenigis la kongresanaron.

Sekva kongresa programero estis parolado de Rafaela Urueña Álvarez, profesorino pri Internacia Juro en la Universitato de Valladolid, per kiu ŝi reliefigis la grandan kulturen enhavon de la Esperanta lingvo kaj ties movado, plene kongruanta kun la koncepto de la UNESKO pri nemateriaj havaĵoj de

la Homaro, inter kiuj, ja, la lingvoj estas grava komponaĵo.

En la vespero de tiu tago okazis ekskursiva vizito al la kavernoj de La Vall d'Uixó, kaj al la historia urbo Sagunto. Poste estis projekciado de du filmoj, en Esperanto, de Roman Dobrzynski: unua pri la Universala Kongreso en Pekino kaj dua pri Rio de Janeiro.

La sekva tago, dimanĉe la 23an de julio la kongresanaro ĝuis tuttagan viziton al la ĉefurbo



Enir-paĝo de "Gazetoteko Lanti"

de la Valencia Regiono.

En la lundo, la 24an, estis interesa prelego far de la filologiisto Pau Mendoza kies titolo estas "Lingvaj normoj ĉe Esperanto". Li pledis por pli grava kaj aktiva rolo de la Akademio de Esperanto koncerne al la atingado de ĉiam pli granda difiniteco kaj logikeco de nia internacia lingvo.

Post la menciita prelego, la gekongresanoj efektive alian turisman viziton, ĉi-foje al la fabrikejo de porcelanaĵoj **Lladró**, kie oni ellaboras la mondfamajn artajn keramikajn figuraĵojn de tiu firmao.

Selva kongres-programero estis iu kurioza arta spektaklo: iu germana esperantistino, Beate Schneider prezentis demonstracion pri la fama arabde-



De maldekstre al dekstre: Augusto Casquero, Alejandro Pareja, Jesuo de las Heras, Pau Mendoza Casp, Pedro A. Garrote Escribano, Rafaela Urueña Álvarez kaj Darío Rodríguez López de Silva.

vena **Ventrodanco**.

Posttagmeze de la sama tago, oni anoncis ke la venontjara HEF-Kongreso okazos en la urbo **Cuenca**, sed poste, post la finiĝo de la Kongreso, evidentiĝis ke ne eblis organizi en tiu urbo la E-Kongreson de la jaro 2007, kaj ŝajnas ke tiu renkontiĝo okazos en la urbo **Huelva**.

Poste okazis la prezentado de du novaj libroj, ambaŭ temantaj pri la biografio de Zamenhof: Unu el ili titoliĝas "Vivo de Zamenhof", kaj estis verkita de Marjorie Boulton kaj eldonita de la Urbestro de Cheste (Valencio), kaj la alia, en la hispana lingvo, titoliĝas "El hombre que desafió a Babel", kaj estis verkita de René Centassi kaj Henri Masson kaj tradukita al la hispana far de membroj de **Madrida Esperanta Liceo**.

Ankaŭ ĉi-tage, okazis, subgvide de Pedro Garrote, debaton pri la konvena agado por la varbado de pli

da membroj por **Hispana Esperanto-Federacio**. La diskutado nepre rilatis kun la afero de la provizora ĉeso de **Boletín**. Ne unuafoje en niaj E-Kongresoj, estis propono eldoni **Boletín**, krom en Esperanto, ankaŭ en la hispana lingvo, sed kromanfoje estis rifuzita tiu propono konsiderante ke en la hispana ŝtato estas pliaj lingvoj krom la kastilia, kaj devus ekzisti egalrajtecon inter ĉiuj el ili. Do, tiu afero restos senŝanĝa; simila solvo estas aplikata en aliaj pluslingvaj ŝtatoj. Ĉiukaze, tiu kunveno ne povus preni iajn decidojn rilate al tiu temo kaj aliaj similaj ĉar tio estas materio pri kiu povas decidi nur la Ĝenerala Asembleo, kiu jam estis okazinta antaŭe. Iamaniere la kunveno estis polemika

rilate al la funkciado kaj la servo kiun HEF liveras al sia membraro.

Menciindas ke dum la Kongresaj tagoj funkciis ene de ĝi Libroservo de SATEH (Asocio **Maldekstro kaj Esperanto**), prizorgita de Pedro Sanz.

La lasta tago de la Kongreso estis la mardo, la 25an de julio. Tiam jam multaj gekongresanoj estis foririntaj revene al iliaj loĝlokoj. La unua tiutaga programero estis prelego de Darío Rodríguez pri la temo: "Esperanto en Interreto", kun prezentado de kelkaj interretaj paĝoj pri Esperanto. Darío reliefigis la gravecon kaj amplekso de la ĉesto de la Internacia Lingvo en la monda reto.

Sekve estis prezentado de alia muzika artaĵo: unue estis kantado de iu esperantistino, Sonia, de la kanzono titolita "Dankon al la Vivo". Poste Luc prezentis recitalon de kanzonoj en Esperanto, kiun li mem akompanis per gitar-ludado. Fine la mondfama valencia violonisto Raul Arias López prezentis violon-koncerton kiu tre multe plaĉis al la ĉestantaro.

Fina progromero estis la gustumado, apud la kongresejo, de paeljo, rizaĵo, kuirita laŭ la valencia tradicio far Inés Comabella kaj Francisco Conejero, geesperantistoj el Castellón. Estis ankaŭ elmontrita pri la preparado de sangrio kaj de t. n. "Akvo de Valencio", koktelo de ĉampano, oranĝa sukco, vokdo...

Resume, la ĉi-jara kongreso de la hispanaj geesperantistoj certe ne troviĝas inter la plej brilaj kunvenoj de la E-movado en nia lando. Tiel pro la malgranda ĉestantaro kiel pro la problemaro pridiskutita, tre evidentiĝas la febleco de la organizita hispana esperantistaro. Sed evidentiĝis ankaŭ la preteco de nia diligenta kolegaro senlace labori por nia idealo. Tiu homa kolektivo meritas sukceson en sia celo kaj certe sukcesos se ni persistas en nia celo.



Diversaj bildoj de la Kongreso

iomete da humoro



KUIRANTE KUN PILAR



Pasteĉoj por teo



Ingrediencoj

300 gramoj da faruno

170 gramoj da butero

100 gramoj da migdaloj

125 gramoj da sukero

unu ovo

Elaborado

Unue oni devas mueli la migdalojn kaj meti aparte la rezultintan pulvoron. Poste oni devas lokigi la farunon laŭ vulkano-forma amaseto kaj enmeti en ties centron la ceterajn ingrediencojn miksante kaj kne-dante la tuton ĝis ties kompleta homogeniĝo.

Sekve oni lasu dum iom da tempo ripozi la mason envolvitan en plasta ujo. Post sterni la mason oni faru el ĝi pecetojn laŭ la deziritaj formoj. Fine oni devas meti la pecetojn en pleton kaj ĉi tiun en fornon kun temperaturo de 160 gradoj kaj restigi ĝin tie dum 15 aŭ 20 minutojn.



91-a Universala Kongreso de Esperanto Florenco, Italio 29 de julio - 5 de aŭgusto 2006

En la itala urbo Florenco okazis, de la 29a de julio al la 5a de aŭgusto 2006 la 91a Universala Kongreso de Esperanto. Aliĝis al ĝi 2209 personoj el pli ol 62 landoj: 302 el Francio, 279 el Italio, 181 el Japanio, 159 el Germanio, 129 el Pollando, 97 el Rusujo, 73 el Brazilo, 72 el Belgio, 64 el Hispanio, 58 el Litovio, 49 el Usono, 47 el Britio, 47 el Nederlando, 44 el Svislando, 43 el Svedio, 42 el Hungario, 41 el Kroatio, 40 el Danio, 38 el Ĉeĥio, 34 el Ĉinio, 32 el Korea Respubliko, 31 el Serbio, 29 el Finnlando, 29 el Israelo, 27 el Bulgario, 22 el Kanado...

Inter la ĉeestantoj troviĝis Ludoviko Zaleski Zamenhof, nepo de la kreinto de Esperanto, kiu sin prezentis dum sia salutado al la gekongresanoj kiel "zamenhofa familiano al la zamenhofa familio". Ĉeestis ankaŭ kelkaj aŭtoritatuloj de Italio, kiel la skabeno de Florenco Eugenio Giani.

La kongresa temo estis: "Lingvoj, Kulturoj kaj Edukado al Daŭrigebla Evoluo", pri kiu prelegis Francois Grin. Alia grava temo estis "Esperantologio kaj la interreto", pri kiu prelegis Bertilo Wennergren. Kaj tiu de Manjula Devi, direktorino de la ITI Centra lernejo en Bangaloro-Hindio pri la Hinda kontribuo al la mondo de scienco kaj matematiko.

Kiel estas kutimo en la Universalaj kongresoj de Esperanto, multaj asocioj kaj fakoj de la mondampleksa esperantista movado okzigas siajn jarajn kunsidojn kaj asambleojn kadre kaj dum la kongreso mem. Tiel okazis, ekzemple, kun la asocioj ISAE (Internacia Scienca Asocio Esperantista) kaj IKEL (Internacia Komitato por Etniaj Liberecoj), kiuj organizis publikajn prelegojn kaj debatojn pri temoj de ilia intereso.

Estis ankaŭ kunsido de la komitato de UEA (Universala Esperanto Asocio) kaj ties subkomitatoj pri financoj, pri informado kaj pri scienca agado. Kunsidis ankaŭ, kaj estigis du prelegojn, la rondo INA (Internacia Naturkuraca Asocio). Menciindas ankaŭ la kunveno de la preskaŭ centjara UMEA (Universala Medicina Esperanto-Asocio), en kiu kunsidis 46 kuracistoj el 17 landoj. Kaj la ĉefkunveno de la sesdekjara IPTEA (Internacia Poŝtista kaj Telekomunikista Esperanto-Asocio) kiu elektis tiam sian novan estraron. Ankaŭ la Muzika Esperanto-Ligo (MEL) faris sian jaran kunsidon por elekti ĝian novan komitaton.



Kutima programero en la Universalaj Kongresoj de Esperanto estas la t.n. **BELARTAJ KONKURSOJ DE UEA**. Tiuĵ de ĉi tiu jaro havis jenan rezulton:

POEZIO: 1-a premio: *Francisco Javier Moleón* (Hispanio) pro "Sed tiam" kaj *Christian Rivière* (Francio) pro "Kvankam silenti"; 2-a premio: *Neide Barros Rêgo* (Brazilo) pro "Mistero"; 3-a premio: *Helena Melnikova* (Rusio) pro "Mia lando".

PROZO: 1-a premio: *Paul Gubbins* (Britio) pro "Nia paradizo bonvenigas"; 2-a premio: *Tim Westover* (Usono) pro "Meduzet"; 3-a premio: *Sten Johansson* (Svedio) pro "Tomatoj el Nederlando" kaj *Lena Karpunina* (Germanio) pro "Trovi kaj perdi".

ESEO: Premio "Luigi Minnaja": *Aleksandr Melnikov* (Rusio) pro "Ekparolu por ke mi vin vidu - aŭ ĉu esperantisto rekoneblas laŭ paroloj"; 2-a premio: *Christian Rivière* (Francio) pro "Tamen kompreni" kaj *Jan Werner* (Ĉeĥio) pro "Pri bono, malbono kaj multkulturismo"; 3-a premio: ne aljuĝita; honora mencio: *Anna Bennett* (Usono) pro "Neperforta komunikado". **TEATRAĴO:** 1-a kaj 2-a

premioj: ne aljuĝitaj; 3-a premio: *Marko Nikolić* (Serbio) pro "Nia diligenta kolegaro"; honora premio *Li Shijun* (Laŭlum; Ĉinio) pro "Cignoj". **KANTO:** 1-a premio: ne aljuĝita; 2-a premio: *Anja Karkiainen* (Finnlando; teksto) kaj *Tarcísio José de Lima* (Brazilo; muziko) pro "Multe pli ol simpati!" kaj pro "Oraj horoj"; 3-a premio: ne aljuĝita. **INFANLIBRO DE LA JARO 2005:** "Arne, la ĉefido" de *Leif Nordensstorm* (Svedio), eldonita de *Kava-Pech* (Ĉeĥio). **FILMO:** 1-a kaj 2-a premioj: ne aljuĝitaj; 3-a premio: *Joe Bazilio Costa* (Brazilo) pro "Tiel estas la vivo"; honora mencio: *Kim Henriksen* (Danlando) pro "Tri muzikvideoj".

En la akto nomata **KLERIGA LUNDO TRA ESPERANTUJO**, ĉi jare estis inkluditaj 15 seminarioj laŭ plej diversaj temoj: movadaj, kulturaj, sociaj, klerigaj, amuzaj...

Ne mankis ankaŭ la belartaj spektakloj: teatraĵoj, muzik-konzertoj... Inter ili menciindas tiu de Andrej Korobejnikov, juna pianisto kiu regalis la E-publikon per sia virtuoza prezento de verkoj de famaj komponistoj: Beethoven, Schubert, Chopin... kaj la religiaj servoj en Esperanto, kiel la ekumenaj vesperaj Diservoj en kiuj partoprenis Proksimume 400 gekongresanoj kaj la posta katolika meso kuncelebrita de kvin pastroj. Kristanaj geesperantistoj povis kunsidi, informiĝi kaj pridiskuti la unnan kaj estontan agadon. G. Verveling prezentis la projekton pri traduko kaj eldono de la tuta Biblio en Esperanto.

Pli ol 40 esperantistoj, kaj inter ili, reprezentantoj de landaj asocioj kiel Danlando, Finnlando, Japanio, Kubo, Kroatio, Nederlando, Rumanio kaj Svedio,

partoprenis la kunsidon pri landa agado por pritaksi nunajn fortojn kaj mankojn rilate la agadon de la movado en la ĉefaj agaddirektoj de la movada laborstrategio.

Ĉi tiu 91a Universala E-Kongreso aprobis jenan rezolucion:



La 91-a Universala Kongreso de Esperanto, kunveninta en Florenco (Italujo) kun 2209 partoprenantoj el 62 landoj, konstatinte,

– ke la Jardeko de Edukado por Daŭropova Evoluigo 2005–2014 estas grava kadro por iniciatoj cele al evoluo kiu estu socie dezirinda, ekonomie vivkapabla, kulture taŭga kaj ekologie daŭrigebla;

– ke nuntempe estas gravaj minacoj kaj al biodiverseco kaj al kultura kaj lingva diversecoj, pro la reciproka dependeco inter la homo kaj la naturmedio;

– ke la nuna superrego je monda skalo de unu lingvo havas maltrankviligajn ekonomiajn, sociajn, kaj edukajn efikojn koncerne daŭro-povecon, lingvan ekologion kaj la rajton je komunikado;

– ke la strebado de la Esperanto-movado al lingva demokratio kongruas kun la valoroj de transnacia edukado celanta informitajn, aktivajn civitanojn, kiuj estu kapablaj kritike kompreni sin mem kaj la ĉirkaŭan mondon por partopreni la evoluprocedon responde kaj solidare.

Alvokas la Esperanto-komunumon aktive engaĝiĝi en la agadoj kiuj, sur diversaj niveloj, strebas antaŭ-enigi praktikojn koherajn kun la principoj de la bezonata ŝanĝoprocezo, kaj utiligi siajn lingvon kaj retojn serve al tiuj klopodoj.

Rekomendas al la Estraro de UEA doni al la ĉi-rilataj problemoj pli da atento en estontaj kongresoj kaj agadoj, partnere kun neesperantistaj organizaĵoj.

Konfirmas la pretecon de la Esperanto-komunumo kunlabori kun

Unesko kaj aliaj organizaĵoj cele al tutviva edukado por paco, socia justeco kaj kultura diverseco, kaj atentigas ilin pri la lingva aspekto de daŭropova evoluigo.

Venontjara Universala Kongreso de Esperanto okazos en la japana urbo Jokohamo.